
ISSN 0032-4361 1 1991

1991


中國報導

# EL POPOLA ĈINIO





Hulunboir-stepo sterniĝas en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. Sur ĝi fluas Morgele-rivero. Jen prezentiĝas ĝia aŭtuna pejzaĝo. Foto de **WU XINHUA**





# Novjara saluto

Malferminte ĉi numeron, vi vidos kalendaron kun bildo de pavo. En Ĉinio pavo simbolas feliĉon. Ĉe la sojlo de 1991 la pavo alportu niajn bondezirojn al niaj legantoj, perantoj kaj amikoj.

Okaze de la 40-jara jubileo de nia revuo en 1990, niaj amikoj sendis al ni gratulajn leterojn kaj telegramojn, kio multe kuraĝigis nin pli bone labori. Fruaŭtune niaj raportistoj vizitis diversajn lokojn de Ĉinio. Ekde ĉi numero vi povos legi iliajn artikolojn kaj ĝui iliajn fotojn, kiuj eble helpos vin bone koni la nunan ĉinan socion.

En la nova jaro vi vidos novajn rubrikojn. La rubriko "Artoj de Ĉinio" prezentos ĉinstilajn pentraĵojn, olepentraĵojn, skulptaĵojn, ksilografaĵojn k.a. novajn verkojn de ĉinaj junaj kaj mezaĝaj aŭtoroj. La rubriko "Medicina Konsultejo" konigos hospitalojn lertajn en kuracado de malfacile kuraceblaj malsanoj. Krome, inter la novaj rubrikoj troviĝas ankaŭ "Loĝdomoj kaj Moroj", "El Ĉinaj Gazetoj", "Mirindaĵoj de Ĉinio" kaj "Modernaj Vestoj".

Ni esperas, ke famaj Esperanto-aktivuloj kaj erudiciuloj de diversaj landoj daŭre kontribuos al la rubriko "Libera Forumo de Eminentaj E-istoj".

La 11-a de marto ĉi-jare estos la 40-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Esperanto-Ligo. En la 3-a numero ni publikigos festajn artikolojn.

Kiel antaŭe ni atendas kritikojn kaj konsilojn de niaj legantoj por senĉese plibonigi nian laboron.

**La Red.**

Ĉe sunsubiro Foto de **WU XINHUA**

MONATA GAZETO ELDONATA DE ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. KESTO 77, BEIJING, ĈINIO

# ENHAVO


4 Novjara saluto

6 **Pri la grava konstruado de Ĉinio**

16 **Grandaj ŝanĝiĝoj de Bashan**

23 Intervjuo kun karboministoj

18 **Por sensuferigi litiazulojn**

44 POR VIA SANO:

Ĉina ĉigong-o

27 ARTOJ DE ĈINIO:

Ŝminkitaj vizaĝoj de herooj de "Ĉe la Akvorando" en pekina opero

20 Ding Jie sur scenejo

37 ANTIKVAJ ĈINAJ FILOZOFOJ:

Filozofo pledanta por interamo

22 EL ĈINAJ GAZETOJ

40 Ĉu aperos alia miraklo de la mondo?

30 Urbo kun malvarma nomo

47 LAŬ LA SUDA SILKA VOJO (20):

Ĉevalaj karavanoj en Bonan-montaro

11 Festivalo sur la Silka Vojo

43 AMUZOJ

36 MIRINDAĴOJ DE ĈINIO

52 Komerca strato en la Somera Palaco

42 SUR NIA LIBROBRETO:

Lernu ludante!

15 Celebrado en Pekino

14 ESP-NOVAĴOJ

42 POR KOMENCANTOJ:

Ŝtelisto, knabineto kaj ŝraŭbturnilo

19, 39 KORESPONDI DEZIRAS

34 KURANTAJ AFEROJ

SUR LA KOVRILO:

Ujgura knabo — Foto de LIU SIGONG

2 Stepo en aŭtuno — Foto de WU XINHUA

4 Ĉe sunsubiro — Foto de WU XINHUA

45 Amantoj de orfiŝoj — Fotoj de LING YOUJUAN

SUR LA DORSKOVRILO:


[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]


Lasta neĝo
Perdriko

de ALEKSANDR KOVALJOV (Sovetunio)


## LOKOJ MENCIITAJ EN ĈI TIU NUMERO


1. Shihezi (p. 30)
2. Zibo (p. 16)
3. Qinhuangdao (p. 6)
4. Qinghai-provinco (p. 11)
5. Xi'an (p. 40)
6. Datong (p. 23)
7. Yunnan-provinco (p. 47)








La Qinshan-a Nukleа Elektrejo

Foto de **YANG XIUYUN**

# Pri la grava kon



La Poliester-fibra Fabriko de Yizheng Foto de **HUO JIANYING**



En laboratorio de sinkrona radiado



# struado de Ĉinio

de **DA WEI**





Foto de **ZHANG PING**



En la Baoshan-a Ŝtala Kompanio

1990 estis la lasta jaro de la Sepa Kvinjara Plano (1986-1990) de Ĉinio. Statistiko farita de koncerna departemento montras, ke en tiu jaro la nombro de la finitaj gravaj konstruoj atingis 30, kun aldono de 87 konstruoj finitaj en la unuaj kvar jaroj de la plano, la sumo estis 117, ĉ. trioble pli multe ol tiu de la Sesa Kvinjara Plano.

De koncerna departemento de la Ŝtata Planiza Komisiono mi informiĝis, ke kvankam en la unuaj jaroj de la Sesa Kvinjara Plano, t.e., kelkajn jarojn post kiam Ĉinio ekpraktikis la politikon de reformo kaj pordomalfermo, impetis la ĉina ekonomio, tamen aperis neharmonia industria strukturo pro ke la prilabora industrio de hejmaj elektraj aparatoj, tekstilaĵoj k.a. multe pli rapide disvolviĝis ol tiuj de energio kaj trafiko. Rezulte de tio, la nacia ekonomio ne povis disvolviĝi stabile kaj kontinue. Tial, la ĉina registaro decidis plimultigi ĉefajn projektojn de la Sepa Kvinjara Plano, pliigi la investon por la fundamenta industrio kaj racie malmultigi la nombron de instalaĵoj por prilabora industrio, kun la celo reguligi industrian strukturon, pligrandigi ekonomian forton kaj fari firman bazon por plua disvolviĝo.

Tiuj ĉefaj projektoj estas deciditaj de la ĉina registaro post scienca demonstrado kaj plenumitaj per centritaj homfortoj, materia fonto, financa fonto kaj intelekto. La fonduso venis el asignaĵo de la ŝtata financa buĝeto, banka prunto, mono kolektita de lokaj organizoj kaj entreprenoj kaj prunto donita de la Monda Banko kaj alilandaj registaroj. Malmulte da konstruoj estis kune investitaj de Ĉinio kaj alia lando, ekz., la Pekina Kolorbildtuba Fabriko de National kaj la Antaibao-a Subĉiela Karbominejo en Pingshuo de Shanxi.

Mu Hong, respondeculo de koncerna departemento de la Ŝtata Planiza Komisiono, diris al mi, ke 80% de la ĉefaj konstruoj de la Sepa Kvinjara Plano apartenis al tiuj por energifonto, trafiko, krudmaterialoj k.a. Tiuj konstruoj ludas gravan rolon en la mildigo de la streĉiteco de energifonto kaj trafiko. Li konigis al mi ankaŭ:

La konstruoj por karba industrio, kiaj la karbominejo Gujiao de Shanxi kaj la granda karbominejo Jungar de la Interna Mongolio, kreskigos la produktokvanton de karbo je pli ol 63 milionoj da tunoj ĉiujare.

En la lastaj kvin jaroj la novaj konstruoj de la grandaj olekampoj Daqing kaj Shengli kaj tiu en Xinjiang kreskigos la produktokvanton de nafto je pli ol 70 milionoj da tunoj.

Estas pli ol 50 konstruoj de hidroelektraj stacioj, grandaj elektrejoj, nukleaj elektrejoj kaj alttensiaj lineoj, kiuj kreskigos la elektran produktopovon je 40 milionoj da kilovattoj.


Kelkdek havenoj kaj ankrejoj estas konstruitaj kaj rekonstruitaj ĉefe por pli facile transporti eksteren karbon produktitan en Shanxi, ekz., la duaperioda konstruo de la fervojo de Datong ĝis Qinhuangdao-haveno kaj la triaperioda konstruo de la granda karbohaveno Qinhuangdao, kiuj plifortigas la rilaton inter la energifontaj kaj krudmaterialaj bazoj de centra kaj okcidenta Ĉinio kaj industrie evoluinta regiono de orienta Ĉinio.

Dank' al la novaj konstruoj de la krudmateriala industrio, oni konstruis kaj rekonstruis nombron da ĉefaj entreprenoj de la ferŝtala industrio kaj grandmezure kreskis la ŝtala produktokvanto.

Krome, estis ankaŭ aliaj gravaj konstruoj, ekz., la Kemifibr-Industria Korporacio de Yizheng, Jiangsu-provinco, Jinan-a Poliester-fibra Fabriko, mastruma konstruo de la Flava Rivero kaj granda konstruo de la 11-a Azia Sportkunveno en Pekino.

La Ŝtata Planiza Komisiono prenis 20 el la 117 ĉefaj konstruoj kiel la plej gravajn kaj praktikis politikon favoran al ili por garantii la konstruadon kaj produkta-


La Antaibao-a Subĉiela Karbominejo en Pingshuo     Foto de **PI DAWEI**



don.

Unu el ili estas la triaperioda konstruo de la karbohaveno Qinhuangdao. Ĝi estas la unua moderna haveno de Ĉinio, kun avangarda tekniko de ŝarĝo. La karboŝarĝa povo de jaro atingis 30 milionojn da tunoj. Por konstrui tiun havenon la ĉina registaro asignis 0.65 miliardon da juanoj. Dank' al la apogo sur siaj propraj fortoj kaj penema laboro, la kontraktantoj de la projekto, konstruado kaj instalaĵfabrikado kunlabore venkis la malfacilon kaŭzitan de alilandaj kontraktantoj, kiuj bankrotis kaj siaflanke ĉesigis la plenumon de la kontrakto. Post 5-jara penlaboro ili sukcese plenumis la taskon. Nun, tiu haveno estas jam lanĉita, karbo estas transportata el Shanxi al la ekonomiaj regionoj ĉe la marbordo de sudorienta Ĉinio.

La unuaj du nukleaj elektrejoj, konstruataj en Qinshan de Zhejiang kaj Dayawan de Guangdong, montras, ke en la paca utiligo de atomenergio Ĉinio akiris gravan sukceson. La Qinshan-a Nuklea Elektrejo estas la unua nuklea elektrejo kun kapacito de 300 000 kilovattoj, projektita kaj konstruata de Ĉinio mem. La ĉina registaro investis al ĝi 1.2 miliardojn da juanoj. En marto 1985 komenciĝis la konstruado, en marto 1990 — la kompleta provado kaj laŭplane en la jarfino tiujare — la elektra produktado. Laŭ la principo "ne polucii la landon kaj ne difekti la interesojn de la popolo" la ĉinaj projektistoj alprenis absolute efikajn rimedojn por preventi la nuklean radiadon. Gvidate de ĉefprojektisto Ouyang Yu, Tong Dingchang kaj aliaj projektistoj faris eksperimenton pli ol 100 fojojn kaj akiris ĉ. 20 000 donitaĵojn, antaŭ ol projekti reaktoron. La reaktoro estas hermetike fermita de la tegaĵoj por hejtaĵo, premado kaj sekureco. Krome, oni alprenis ankaŭ rimedojn por ŝirmi ĝin de tertremo, tajfuno kaj tajdo.



La Pekin-Tianjin-Tanggu-a Aŭtovojo
Foto de **SONG LIANFENG**





Ŝarĝaŭtoj kun marko Steyr
Foto de **SHI PANQI**

La gravaj konstruoj tuŝas la koron de la tutlanda popolo kaj alportas al ĝi feliĉon. Depost 1982 en Jiangsu aperis 31 gravaj konstruoj kun totala investo de 23 miliardoj da juanoj. 19 el ili estis finitaj kaj komencis produktadon.

El la kemifibro ĉiujare produktita de la Kemifibr-Industria Korporacio de Yizheng oni povas teksi 5 miliardojn da metroj da poliester-fibra ŝtofo, ĉiu ĉino meznombre povas ricevi 4 metrojn. Kun multiĝo de ŝtofoj oni povas pli bele vesti sin.


Dank' al la finkonstruiĝo de granda nombro da termoelektraj generatoroj, en kelkaj jaroj duobliĝis la ĝenerala generatora kapacito de Jiangsu. En la lasta jaro, en Nankino, titolita per "forno", la nombro de elektraj ventumiloj por ĉiu cento da familioj superis 200.


Serio da gravaj konstruoj de trafiko ŝanĝis la postiĝintan transportadon de Jiangsu kaj formis trafikan reton el haveno, fervojo kaj ŝoseo. Produktoj de Jiangsu povas esti elportitaj aliloken, dum la alilokaj povas esti enportitaj en la provincon, tiel ke pli facilas la vivo de la lokanoj. Nun Jiangsu-anoj povas ĝui akvomelonojn de Hainan-provinco, longanon (*Euphoria longan*) de Fujian-provinco, Hami-melonojn de Xinjiang kaj pirojn de Hebei-provinco. ■



En la Pekina Kolor-bildotuba Fabriko — Foto de **XUE CHAO**

Akvomastruma konstruo en la malsupra parto de la Flava Rivero





Tendoj ĉe Qinghai-lago

# *Festivalo sur la Silka Vojo*

Teksto kaj fotoj de **LI QIANG**



Tibet-naciaj virinoj festvestitaj



Mediumado

La antikva Silka Vojo komenciĝas ĉe la baseno de Weihe-rivero de Ĉinio, etendiĝas okcidenten je miloj da km kaj interligas Azion, Afrikon kaj Eŭropon. Ĝi estis grava trairejo por la ekonomia kaj kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj Eŭropo. Nun la antikva Silka Vojo estas anstataŭita de moderna trafikilo. Tamen, multaj historiaj objektoj sur la Silka Vojo fariĝis gravaj riĉfontoj por disvolvi la ĉinan turisman aferon. Por celebri la 2 100-jaran jubileon de la antikva vojo, en somero kaj aŭtuno de la pasinta jaro ĉina turisma departemento renovigis siajn servojn en la Nordokcidento, al kiuj apartenis la Qinghai-a Turisma Festivalo kun kunveno de *hua'er*-oj, surkampa tendofajro kaj religia aktivado kiel la ĉefa enhavo.

"*Hua'er*-o" estas popolkanta kunveno de diversnaciaj popolanoj de Qinghai-provinco, kiu okazas de generacio al generacio, kaj ankaŭ granda konkurso de popolaj kantistoj. En kanto komenciĝis la turisma festivalo, kiu daŭris por unu semajno. Iu tunacia kantisto kantis: "Orfazanoj kveras en montoj, poste kantas alaŭdoj. Kuniĝas diverslokaj kantistoj, kaj konkursas pri *hua'er*-kantoj." Tiutempe en ĉiuj parkoj de la provinca ĉefurbo Xining troviĝis konkursejoj, kie svarmis homaj fluoj. La kantistoj kantis kun granda entuziasmo. En la tri sinsekvaj tagoj oni kantis de la tagiĝo ĝis la sunsubiro. Kaj ankaŭ ni gastoj venintaj de malproksime estis kortuŝitaj de la spektaklo kaj ekhavis la intencon kanti.

Qinghai-altebenaĵo estas dezerta. Tre malmultaj estas vilaĝoj kaj tendoj. Sur la vastega stepo sin paŝtis gregoj da gruntbovoj kaj ŝafoj. Tamen por partopreni la festivalon, tibetnacianoj vivantaj en spaco de centoj da km, rajdante sur ĉevaloj kaj kuntrenante tendojn kaj kuirilojn, kolektiĝis ĉe la ondanta Qinghai-lago. Sur la stepo estis starigitaj vicoj kaj vicoj da tendoj kaj regis granda spektaklo. La tibet-naciaj virinoj en belaj vestoj aĉetis diversajn objektojn antaŭ la budo starigita de magazeno. La grandskala interŝanĝo de varoj estas ĉefa konsistiga parto de la turisma festivalo.

Noktiĝis. Sur la stepo brulis fajro. Turistoj el Britio, Germanio, Japanio kaj Italio kaj anoj de la vizitgrupoj el Taiwan kaj Hongkongo, sume 143 personoj, kune kun tibet-naciaj paŝtistoj, sidiĝis ĉ. la tendofajro, kaj gajeco regis sur la stepo. La nokto sur ĝi estis malvarma. Neatendite, en varma somero ni devis porti peltan surtuton por rezisti kontraŭ malvarmo. Apud la fajro tibetnaciaj paŝtistoj prezentis al gastoj sekalvinon kaj blankajn silkajn rubandojn laŭ sia nacia ku-



Lamaoj en Tar-templo

Tibet-naciaj paŝtistoj en la festivalo



timo kaj ankaŭ dancis nacian dancon. La tibet-nacianoj estas kantemaj kaj dancemaj. Ilia danco karakteriziĝas per forta ritmo kaj bela movo. La piedfrapa danco estas plej originala. La dancantoj kriis de tempo al tempo en prezentado. La flamanta fajro krakadis kaj ruĝigis la stepon.

Dum la turisma festivalo okazis ankaŭ konkursoj pri ĉevalvetkuro, lukto, arkopafo k.a. ŝatataj de tibetanoj. Ĉevalvetkuro estis spektakla. 150 konkursantoj estis dividitaj en 10 grupojn. La vetkura distanco estis 2 km. Tuj post la signalodono la rajdantoj ekkuris kaj spektantoj ilin aklamis. La venkintoj akiris premiojn. Ankaŭ iliaj ĉevaloj estis honoritaj per ruĝa sateno kaj, kondukate de la mastroj, iris preter la spektantoj, kiuj huraante gratulis ilin.

Rigardante tiujn fortikajn paŝtistojn, oni rememoris la nomadojn sur la stepo, kiuj malfermis kaj konstruis la antikvan vojon. Estis ili, kiuj paŝtis sur herbejo kaj ĉe rivero, kaj, preterpasinte krutajn montojn, Gobion kaj dezerton, kreis pecojn kaj pecojn da malgrandaj verdejoj kaj interligis ilin per longa vojo. La antikvaj nomadoj kontribuis multe por la ĉina trafika historio.

La lasta aktivado de la turisma festivalo estis rigardi sunumadon de granda bildo de Ŝakjamunio en la fama budhisma Tar-templo. Kiam ni venis al la templo, lamaoj, elportinte la grandan bildon de Ŝakjamunio el la halo, iris al la sunumejo, akompanate de klarionistoj, budaistoj kaj rigardantoj. Kiam la bildo estis portita sur la supron de la montodeklivo, ĉe la montpiedo oni okazigis preĝan ceremonion por bonvenigi la bildon. Post kiam eminenta bonzo finis sutroreciton, oni disvolvis la bildon sur la sunumejo. Sub la suno la bildo aspektis pli majesta. Regis serioza atmosfero sur la loko. Multaj bonzoj kaj budaistoj genuis antaŭ la bildo de Ŝakjamunio por peti lian benon. Post duonhoro, oni reportis la bildon en la templon. La sunumado de la bildo estas unu el la ĉefaj religiaj aktivadoj de Tar-templo. Ĉiujare ĝi okazas dufoje. De la lastaj jaroj ĝia skalo pli kaj pli grandiĝas. Multaj budaistoj venis preĝi, malgraŭ longa vojaĝo. Ĝia religia mistiko allogas pli kaj pli multajn turistojn de Ĉinio kaj aliaj landoj.

Nelonge post la sunumado, en la amuzejo de Tar-templo okazis mediumado. Post kiam oni ekklarionis, sonis tamburoj kaj gongoj. Kondukate de la ĉeflamao, 4 "skeletoj" dancis skeletan dancon. Ili en diversaj pozoj montris la doloron, ke ili ne povas sin liberigi de suferoj, kaj esprimis sian opinion pri la vivo — vivo kaj morto definitivaj. Poste, ili dancis kvarcervan dancon, kiu prezentas la diron, ke ĉie, kie kreskas vivaĵoj, estas dezertoj, t.e. "ĉio malplena" laŭ religia doktrino. Diversaj religiaj dancoj donis ian sugeston. La plej interesa el ili estas, ke unu monaĥo kaj 6 ŝramanoj surscenigis kiel roluloj de almozdonantoj de budaismo. Ili kondutis pie kaj mienis afable, kio pli ĝuigis la mediumadon. Fine, ĉiuj gardistoj, militistoj, protektantaj dioj, cervoj kaj skeletoj kune dancis por esprimi sian deziron, ke post sia morto ili ankoraŭ faru bonon al la homoj. ■


## ABONTARIFO DE EPĈ POR 1991

| Lando | Valuto | 1 jaro | 2 jaroj | 3 jaroj |
|---|---|---|---|---|
| Aŭstralio | AUD | 16.00 | 26.00 | 36.00 |
| Aŭstrio | ATS | 215 | 360 | 500 |
| Belgio | BEF | 620 | 1020 | 1400 |
| Germanio | DEM | 32.00 | 54.00 | 76.00 |
| Britio | GBP | 9.50 | 15.00 | 21.00 |
| Finnlando | FIM | 72.00 | 117.00 | 163.00 |
| Francio | FRF | 102.00 | 165.00 | 225.00 |
| Hispanio | ESP | 1550 | 2500 | 3500 |
| Italio | ITL | 20600 | 33500 | 46500 |
| Japanio | JPY | 3000 | 5400 | 7500 |
| Nederlando | NLG | 35.50 | 61.00 | 85.00 |
| Nov-Zelando | NZD | 21.70 | 36.00 | 50.00 |
| Portugalio | PTE | 1550 | 2500 | 3500 |
| Svisio | CHF | 26.80 | 44.00 | 64.00 |
| Usono | USD | 15.50 | 26.00 | 36.00 |
| Kanado | CAD | 15.00 | 25.00 | 35.00 |
| **Por aliaj landoj en Eŭropo:** | | | | |
| | USD | 11.50 | 18.50 | 26.00 |
| **Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:** | | | | |
| | USD | 7.80 | 12.50 | 17.50 |

## ESP-NOVAĴOJ

● De la 14-a ĝis la 15-a de septembro 1990 okazis en Tianjin la Esperanto-Seminario pri Ĝemelurba Interfluo (ESĜI) iniciatita de la Tianjin-a E-Asocio. Ĝin ĉeestis samideanoj el Pekino, Ŝanhajo, Tianjin, Shenyang, Ningbo, Tangshan, Shandong, Interna Mongolio kaj aliaj lokoj. En la seminario la ĉeestantoj konigis la E-laboron kaj interŝanĝis spertojn kun alilandaj Esperantaj ĝemelaj urboj. Ili opinias, ke oni devas energie fari tiun ĉi laboron, ĉar ĝi estas utila al la interŝanĝo de diverslandaj E-organizoj kaj esperantistoj kaj ilia kunlaboro.

● En 1990-1991 la fremdlingva fakultato de la Shandong-a Universitato funkciigas 2-jaran kurson de Esperanto kiel dua fremda lingvo.

● La Maljunula Universitato sub la Ĉina Akademio de Sciencoj organizis la 2-an E-kurson, en kiu lernas pli ol 30 altklasaj kaj mezgradaj sciencistoj kaj teknikistoj. La unuaj 30 lernantoj finis sian studon en oktobro 1990.

● Antaŭvespere de la 11-a Azia Sportkunveno, Pekino, la Ĉina E-Eldonejo eldonis 2 seriojn da poŝtkartoj "Stadionoj kaj Sporthaloj por la 11-a Azia Sportkunveno" kaj "Azia Sporturbo en Beijing" kaj jam distribuis 200 000 kompletojn. Por financi la 11-an Azian Sportkunvenon, la redakcio de "El Popola Ĉinio" kaj la Ĉina E-Eldonejo kune donacis al la kunveno 10 000 kompletojn da tiuj poŝtkartoj.

● En la 22-a de septembro 1990, kiam inaŭguriĝis la 11-a Azia Sportkunveno, la Shenyang-a Poŝtmarka Kompanio kaj la Liaoning-a E-Asocio kune emisiis Esperantan memorkoverton kun speciala stampo en Esperanto. Jen la epigrafo sur la koverto: "Bone lernu Esperanton por servi al la 11-a Azia Sportkunveno." Samtage la Zhengzhou-a Poŝtmarka Kompanio kaj la Henan-a E-Asocio kune faris Esperantan stampilon kaj ĝin uzis. Ankaŭ la poŝta departemento de Nankino, Qingdao, Haikou, Nanchang, Suzhou, Jiangmen, Ma'anshan, Changshu kaj aliaj urboj faris memoran stampilon de Esperanto.

● Profesi-nivelan Art-Ekspozicion pri Infan-Desegnaĵoj dum januaro 1991 zorgas Rio-deĴanejro E-Asocio. 30 21 cm sendotaĵoj. Bona papero. Temo laŭvola. Sendu al: Caixa Postal 840-CEP 20001 Rio-de-Ĵanejro Brasil.

● En 1-10-a de julio 1990, en la pitoreska kaj ekzotika Kaŭkazia montara respubliko — Dagestano ĝuste sur bordo de Kaspia maro pasis la 1-a Internacia Tendaro Esperantista Maramika (ITEM-90). Ĝin partoprenis ĉirkaŭ 50 esperantistoj el diversaj landoj kaj Sovetunio.

En la jaro 1991 okazos la 2-a ITEM, la Dagestana Esperanto-Centro invitas vin partopreni ĝin. Nia adreso: USSR, SU-367013, Maĥaĉkala-13 Abon. jaŝĉik 11, Esperanto-Centro.

● Fondiĝis "Esperanto-Centro Halle" en Germanio. Ĝi pretendas esti memstara kaj sendependa entrepreno servanta al la Esperanto-movado rilate la disvastigon de Esperanto kaj kreadon de aplikebleco sur turisma, kultura kaj faka kampoj. Ĝi ankaŭ deziras kunlabori kun aliaj similcelaj centroj.

La Esperanto-Seminario pri Ĝemelurba Interfluo



La Esperanta memorkoverto por la 11-a Azia Sportkunveno



# Celebrado en Pekino

de **RANKA MRAKOVIĈ** kaj **DAVOR ŜTIMEC** (Jugoslavio)

JUGOSLAVIO estas unu el tiuj landoj, kiuj en la historio de evoluo de la gazeto "El Popola Ĉinio" en la lastaj jaroj troviĝas ĉe la pinto rilate la nombron de la legantoj.

Kvar jardekoj da kontinua apero, riĉa kaj varia enhavo, abundaj interesaj fotoj, kiuj ankaŭ stimulas komencantojn serĉi la unuajn komprenatajn vortojn, kaj ne laste la alirebla prezo, jen "sekreto" de la sukceso de "El Popola Ĉinio" en Jugoslavio.

Kelkfoje estas agrable vidi en aŭtobuso, kiel nekonata vojaĝanto foliumas "El Popola Ĉinio". Pluraj jugoslavaj perantoj kontribuas al disvastigo de la gazeto. Estas domaĝe, ke en la celebra festo ne eblis renkonti pli da perantoj kaj diverslandaj legantoj.

La celebro de la 40-jara jubileo de "El Popola Ĉinio" proponis ankaŭ multajn okazojn konatiĝi kun diversaj aspektoj de Ĉinio. Tion profitis esperantistoj el Francio, Japanio, Koreio, Belgio, Sovetunio kaj ankaŭ ni du el Jugoslavio.



La aŭtoroj Ranka Mrakoviĉ (maldekstre) kaj Davor Ŝtimec (dekstre) sur la Granda Muro

Pro favora bileto ni devis surprizi niajn gastigantojn per preskaŭ unusemajna tro frua alveno. Ni timis pro tia ĝeno. Sed jam ĉe la flughaveno en Pekino ni ekĝojis vidinte la verdan flageton en la manoj de paciencaj atendantinoj. Kiam ni renkontis ilin, ni ĉesis esti anonimaj turistoj, kiuj vizitas Pekinon. Ni fariĝis elkore prizorgataj gastoj, kiuj tian fabelan traktadon antaŭe ne povis imagi.

La Ĉiela Altaro, Beihai-parko kun sia Blanka Pagodo, la Naŭdraka Muro, Imperiestra Restoracio estis la lokoj de niaj haltoj kaj admiroj. La Somera Palaco kun sia Granda Vojo kaj la Ŝtona Ŝipo, la etoso de la teatro, Parko ĉe la Templo de Kuŝanta Budho estas nur palaj vortoj, kiuj en memoro elvokas multajn emociojn.

Ni ĉeestis ankaŭ Internacian Akademian Konferencon pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto. Tio jam estis la tria sinsekva sekcio. Ĝia aldona programo mirigis nin kun siaj spirhaltigaj akrobataĵoj.

Dum la restado ni ankaŭ havis specialan viziton al fama kuracisto en porfremdula hospitalo por kuraci tuson, kiu ĝenis dum pluraj monatoj jam en la hejmlando. Per helpo de la traduko de niaj afablaj gvidantinoj, Esperanto helpis konatiĝi kun nekutima aspekto de la ĉinaj tradiciaj medikamentoj, kiuj eĉ hodiaŭ en Jugoslavio memorigas pri la ĉina etoso.

La amikeca balo, renkontiĝo kun pekinaj esperantistoj estis plua ero en nia konatiĝo kun la Esperanta vivo de Pekino.

La celebro komenciĝis en festa etoso, kiu enkondukis tekunvenon, en kiu eblis renkonti multajn gravulojn el la Esperanta vivo de Pekino. Aparte impresis ĝojiga kunestado de dignaj pioniroj kaj veteranoj kaj de multaj prestiĝaj personoj el la kultura vivo de Pekino.

La festo de la revuo, kiu en kvar jardekoj el anonima bulteno kreskis al unu el la plej prestiĝaj gazetoj de la monda Esperanto-movado, montris al ni bildkarte famajn momentojn de Pekino: La Somera Palaco estis la unua celo, al kiu direktiĝis nia Esperanto-grupo. Sekvis la ekskurso al Mingtombejo kaj aldone vojaĝo al la Granda Muro.

Poste nia helpema gvidanto s-ro Wang Ruixiang gvidis nin tra Nankino. Tie ni propraokule povis vidi la Grandan Ponton sur la rivero Yangzi, la fieron de la ĉina laboro. En Nankino ni renkontiĝis kun esperantistoj, veteranoj, oficialuloj kaj studentoj en la Universitato de Nankino. Kune ni vizitis Maŭzoleon de Sun Jatsen.

La vizito al la famaj ĝardenoj de Suzhou, boatveturado sur la rivero en Ŝanhajo estis kronitaj per la vizito al Hangzhou. Tie eblis samopinii kun la penso de Marko Polo "En la Ĉielo ekzistas Paradizo, sur la Tero ekzistas Hangzhou".

Dankon al ĉiuj karaj gesamideanoj en Ĉinio, kiuj montris al ni sian imponan landon. ■

# Grandaj ŝanĝiĝoj de Bashan

BASHAN estas vilaĝo en Boshan-distrikto de la urbo Zibo, Shandong-provinco. Ni vizitis ĝin en la pasinta septembro.

### LA UNUA PROFUNDA PUTO

Situante en montregiono, Bashan multe suferis de trosekeco en la pasinteco. Maljunuloj de la proksimaj lokoj bone memoras la mizeron de Bashan. La tieaj loĝantoj multe suferis de malriĉeco kaj pro tio eĉ vendis siajn gefilojn. Manko de akvo estis unu el la plej gravaj malfaciloj en Bashan. Tie troviĝis nur unu malprofunda puto, kies dolĉa akvo apenaŭ sufiĉis por la homoj kaj brutoj. En aliaj putoj estis sala akvo. Kiam trosekeco trafis Bashan, la vilaĝanoj devigite portis akvon el aliaj vilaĝoj. En 1978, la jara totala enspezo de agrikulturo kaj flankokupo de la vilaĝo estis nur 250 000 juanoj kaj la pokapa enspezo estis 88 juanoj, egalaj al monata enspezo de urba laboristo.

"Ĉu tio estis nia kulpo?" diris la 41-jara Sun Qiyu, fortika kaj honesta estro de la komitato de la vilaĝanoj. "Niaj samvilaĝanoj ne obstinis en malnova rutino, nek estis destinitaj por tiel vivi. Tio dependas de tio, kiun politikon niaj gvidantoj praktikas."

Li pravas. Antaŭ 10 jaroj la kamparanoj povis fari nur grenan kulturon. Oni malpermesis al ili kultivi legomojn por vendi. Eĉ talentuloj ne povis elvolvi sian kapablon. Bashan-anoj devigite vivis jaron post jaro de la ŝtata monhelpo.

En 1979, Ĉinio ekpraktikis la politikon de reformado kaj pordmalfermado, kiu ekscitis la ambicion de Sun por konstrui la hejmlokon. Tiam s-ro Sun laboris en la distrikta registaro. La unua afero, kiun li plenumis post sia reveno al la hejmvilaĝo, estis fosi putojn.

Sun bone sciis, ke iu faka departemento asertis, ke la loko estas senakva post ĝia esploro sur la montodeklivo nemalproksima de la vilaĝo. Tamen li opiniis, ke sen risko ne venos sukceso.

En januaro de 1979, kiam neĝego blokis vojojn, Bashan-vilaĝo komencis fosi la unuan puton per pruntita mono.

La terkrustaj rokoj estas malmolaj, kelkfoje oni fosis unu-tage nur 240-300 mm. Sun kaj aliaj gvidantoj de la vilaĝo restis tage kaj nokte ĉe drilmaŝino. Oni boris 50 m... 100 m... 500 m... La koro de Sun premiĝis pli kaj pli forte. Finfine, akvo elŝprucis, kiam la drilo atingis 650 m. La neelĉerpebla akvo senĉese elŝprucis el la puto kaj allogis ĉiujn vilaĝanojn al si. Vidante la klaran dolĉan putakvon, iu 80-jara maljunulo emociiĝis ĝis larmoj.

Tiele, Bashan fosis sinsekve 6 profundajn putojn. Dank' al tio, la vilaĝanoj havas sufiĉan akvon ne nur por ĉiutaga vivo, sed ankaŭ por irigacio de kampoj.

S-ro Zheng Zhenjie (maldekstre) vizitas novan kamparanan loĝejon.



### STREBADO AL RIĈIĜO

La tero estas honesta. La pliboniĝo de la irigaciaj kondiĉoj finis la historion, ke Bashan-vilaĝo ne povis sin vivteni. Bashan-anoj ekspluatis 27-hektaran fruktoĝardenon per 400 000 juanoj komune akumulitaj. La arboj frue plantitaj nun jam fruktodonas.

Kvankam ili rikoltis iajn fruktojn, tamen Sun kaj liaj kamaradoj profundiĝis en la meditado: Sub la realaj kondiĉoj de Bashan, kie la meznombra pokapa agro estas nur 0.027 hektaro, ne eblas

de LIU CHIZHONG

kaj ZHENG ZHENJIE



En la maljunulejo

riĉiĝi por la vilaĝanoj, kvankam Ĉinio estas granda lando kun 1.1 miliardoj da loĝantoj kaj la agrikulturo, la bazo de la nacia ekonomio, devas stabile disvolviĝi.

Ekde 1981, rompinte la tradician metodon de grena kulturado en miloj da jaroj, bashan-anoj gviditaj de Sun fondis la Boshan-an Tinktur-tekstilan Fabrikon, la unuan tekstilan entreprenon de Bashan, post 3-monata tagnokta laboro sur malglata montodeklivo norde de la vilaĝo. Por bone funkciigi la fabrikon, ili pruntis monon kaj invitis eminentajn teknikistojn el Ŝanhajo. Tute ekster ilia atendo laŭ la juĝo de fakuloj iliaj produktaĵoj atingis la avangardan nivelon enlandan kaj en la sama jaro ilia produktovaloro atingis 350 000 juanojn.

Sun opiniis, ke oni ne devas sole fari la produktaĵ-prilaboron. En 1983, kune kun la 5-a Ŝanhaja Tekstila Fabriko, post 6-monata laboro, ili starigis fabrikon de sportistaj vestoj kun jara produktokapablo de 400 000 vestoj. En 1983 ĝia jara produktovaloro atingis 800 000 juanojn.

Dank' al sia entuziasmo, la montanoj rompis la katenon de la etkamparana ekonomio kaj starigis sinsekve lanŝpinejon, fabrikojn de tukoj kaj kotonaĵoj kaj aliajn 8 entreprenojn. Importinte el Japanio kaj Usono avangardajn instalaĵojn, ili fondis Wantongda-Kompanion de Boshan, Shandong-provinco kun ŝpinado, tinkturado kaj teksado kiel la ĉefa laboro. Sun estas ĝia ĝenerala direktoro. Pro tio, ke la kompanio donis grandan atenton al la utiligo de talentuloj kaj la kvalito de produktaĵoj, la fizikaj normoj de ĝiaj pli ol 20 specoj da produktaĵoj atingis la ŝtatan normon. El ili la ĵakardaj lavtukoj estis premiitaj en la ekspozicio de eksportaj kaj famaj varoj okazigita de la Ŝanhaja Ekonomi-ekspluata Distrikto, 1989.

Nun la jara totala industri-agrikultura produkto-valoro de Bashan estas 110 milionoj da juanoj kaj la totala nombro de la fiksa kapitalo — 80 milionoj da juanoj.

## SAME KIEL EN URBO

La bashan-anoj opinias, ke ili vivas same bone kiel urbanoj, kvankam tie ne vidiĝas trafikllumoj, nek multaj veturiloj kaj homaj fluoj.

En Bashan-vilaĝo, ni vidis en matenkrepusko, ke gejunuloj en bonaj vestoj kaj kun ĝojo iras al sia laborejo.

En tiu nova vilaĝo ne plu vidiĝas pajlaj kabanoj, terdometoj kaj mallarĝaj, kotaj vojetoj. Tie staras vicoj da fabrikdomoj, belaj etaĝdomoj, puraj kaj larĝaj ŝoseoj kondukantaj al la urbo Zibo. Nun la 1 281 vilaĝanoj plejparte loĝas en sep etaĝdomoj kun areo de pli ol 24 000 kvadrataj metroj. En tiuj 5-etaĝaj domoj bone projektitaj kaj bele ornamitaj, oni havas elektran, akvan kaj gasprovizadon, radiatorojn k.a.


Krome nun en Bashan estas hospitalo, magazeno, lernejo kaj infanĝardeno. 80 infanoj de la vilaĝo estas senpage vartataj de la infanĝardeno, ankaŭ la elementlernejanoj senpage vizitas lernejon. Ĉiuj mezlernejanoj kaj studentoj estas stipendiataj.

Por komfortigi la vivon de la oficistoj kaj laboristoj, en Bashan oni konstruis grandan halon, kiu povas enteni 2 000 homojn. Krom tio, oni starigis etaĝdomon kun areo de 4 000 kvadrataj metroj por gefraŭloj. Aparte menciinde estas, ke 120 gemaljunuloj senescepte vivas feliĉe. La vilaĝo Bashan decidis, ke la 60-jaruloj kun aŭ sen gefiloj ĉiuj povas loĝi en la maljunulejo. La vilaĝo pagas por iliaj manĝaĵoj, vestoj, kuracado kaj donas al ili poŝmonon.

La tieaj laborfortoj plejparte sin turnis de kamplaboro al la vilaĝaj entreprenoj. Ili redonis la agron, kiun ili prenis laŭ kontrakto, al la vilaĝo por ke aliaj ĝin kultivu. Allogate de la tieaj ŝanĝiĝoj, 40 bashan-anoj, kiuj laboris en urbaj entreprenoj, sinsekve revenis labori en Bashan. ■


# Por sensuferigi litiazulojn

de **SUN GUOLIANG**



S-ro He Shenshu kuracas pacienton.

Paciento post kuracado



FOJE, mi gastis ĉe mia amiko. Kiam ni ĝoje interparolis, li subite vekriis de abdomena doloro. Grandaj ŝvitgutoj fluis de sur lia frunto. En hospitalo kuracistoj diagnozis, ke li suferas de urina litiazo kaj devas enhospitaliĝi por ricevi kuracon. Mi mallaŭte diris al lia edzino: "Eble li estos operaciita." Neatendite, post unu semajno mia amiko vizitis min. Kun granda miro mi demandis: "Vi tiel rapide resaniĝis!?" Li respondis: "Fakte oni faris al mi ne operacion, sed eksterkorpan gruzodisrompon." Kuracisto He Shenshu, la kreinto de la tekniko de eksterkorpa gruzodisrompo en Ĉinio, estas estro de la Gruzodisrompa Instituto de la Popola Hospitalo sub la Pekina Medicina Universitato.

Por viziti tiun estron mi venis en la instituton. Je la intervidiĝo mi diris al li, ke min interesas la tekniko de eksterkorpa gruzodisrompo. Li konigis al mi, ke ĝi estas aplikata en multaj landoj. Li prezentis sin al mi: "Antaŭe mi estis urologo kaj ofte faris operacion al litiazuloj. Ilia vekriado post operacio instigis min studi pri la tekniko."

En 1982, el simpla materialo He Shenshu informiĝis, ke alilande estas provfarita eksterkorpa gruzodisrompilo multekosta. Li do decidis per siaj propraj fortoj fari tian aparaton.

Li prezentis sian projekton al gvidantoj de la hospitalo. Tiam, nemalmultaj opiniis, ke estas tre malfacile por Ĉinio fabriki eksterkorpan gruzodisrompilon. Tamen, la gvidantoj subtenis lian projekton kaj kreis al li bonajn kondiĉojn por esplorado kaj provfarado. Sekve, He Shenshu eklaboris kun la Elektroteknika Instituto kaj Meĥanika Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, Pekina Fabriko de Universalaj Elektronikaj Instalaĵoj k.a. por provfari eksterkorpan gruzodisrompilon.

Post proks. dujara penado, en

oktobro 1984, He Shenshu kaj liaj kunlaborantoj sukcesis fabriki la unuan ĉinan eksterkorpan gruzodisrompilon EBPH-1.

En julio 1985, per tiu aparato oni unuafoje sukcesis kuraci suferanton de rena litiazo, kaj poste, pli ol 50 suferantojn de tia malsano. En decembro samjare ĝi trapasis teknikan ekspertizon.

En praktiko He Shenshu kaj liaj kunlaborantoj plurfoje faris renovigon kaj produktis pli avangardajn aparatojn EBPH-2 kaj EBPH-3.

Kiam mi demandis lin pri la trajtoj de la aparato fabrikita de Ĉinio, He Shenshu konigis al mi: unue, ĝia prezo estas malalta. La prezo de tia aparato estas egala al malpli ol dekono de tiu de la importita. Due, por disrompi gruzon per tia aparato oni bezonas nur kranakvon, dume per la importita necesas mezona akvo. La prezo por trakti mezonan akvon egalas al kvarono de tiu de la aparato. Trie, la kuracado per gruzodisrompilo fabrikita de Ĉinio ne kaŭzas malutilan efikon al la koro de malsanulo, dume per la importita necesas preni koroprotektajn rimedojn. Kvare, estas alta la kuracefiko. La procentaĵo de resanigitoj de urina litiazo estas 99%. Ankaŭ estas alta la procentaĵo de resanigitoj de gala litiazo. Laŭ teknika postulo oni tabuas disrompon de gruzo kun diametro de pli ol 20 milimetroj kaj devas forigi la gruzon per operacio. Tamen en 1985 la gruzodisrompilo fabrikita de Ĉinio tion sentabuigis kaj sukcese disrompis gruzon kun diametro de 40 milimetroj. La litiazo de sola reno antaŭe estis nekuracebla, tamen per ĉina gruzodisrompilo oni sukcese kuracis multajn tiajn kazojn.

He Shenshu diris al mi, ke por kuraci litiazon necesas ne nur disrompi gruzon, sed ankaŭ forigi la disrompitan gruzon el la korpo. Se la disrompita gruzo ne estas forigita, la malsano do devas esti kuracata ankoraŭ per operacio. Ankaŭ en tiu flanko estas avangarda la gruzodisrompilo de Ĉinio. Ĝi povas diserigi gruzon per eksplodo, por ke la malsanuloj povu facile ekskrementi ĝin. Krome, la instituto esplor-akiris kompleton da metodoj por reguligi la korpan pozicion, ke la malsanuloj kuŝu surlite en pozo postulata de kuracisto por facile ekskrementi la disrompitaĵojn. Per tia gruzodisrompilo la instituto sukcese kuracis milojn da suferantoj, kaj neniu el ili estis operaciita.

El la 300-400 gruzodisrompiloj de Ĉinio nur du estas importitaj, kio montras, ke estas tre bonvenaj la gruzodisrompiloj de la lando.

En la kuracejo mi vidis alilandan pacienton kuracata. Li trankvile ventrokuŝis sur la gruzodisrompilo, kun bovlo da akvo sub la ventro. Garbo da lumo brilis sur la korpoparto kun gruzo kaj aŭdiĝis klakado foje kaj foje. Du kuracistinoj observis la kuracefikon en la fluoresko-ekrano, sidante antaŭ la B-ultrasona aparato, kiu ligiĝis kun la gruzodisrompilo. Post la kuracado mi iris al tiu suferanto kaj deziris, ke li resaniĝu kiel eble plej baldaŭ. Li kun rido diris al mi, ke li estas iranano kaj de multaj jaroj suferas de litiazo. Li estis nekuracebla en sia lando, ĉar li havas solan renon. Fine, en la ĉina lingvo li diris: "Bone, bone!" Mi komprenis, ke li laŭdis la gruzodisrompilon. La instituto sukcese kuracis suferantojn de gravaj malsanoj el Irano, Koreio, Indonezio, Malajzio k.a.

Kiam mi demandis lin pri la pago por kuraco, li diris al mi, ke la plej multa pago estas nur mil juanoj.

Antaŭ nelonge, la gruzodisrompilo EBPH-3 fabrikita de la instituto gajnis la oran medalon de "Ekspozicio de Scienc-teknikaj Fruktoj de Medicinaĵo kaj Higieno de Ĉinio". En 1987 ĝi gajnis la unuan premion de ŝtata scienc-teknika progreso. Nun, ili donis alian feliĉan informon al la klientoj: naskiĝis la eksterkorpa gruzodisrompilo EBPH-5 projektita de ili. ■

## KORESPONDI DEZIRAS

* Li Liang volonte dissendos al la legantoj de EPĈ la E-koverton de la 11-a Azia Sportkunveno, kondiĉe ke oni sendu sian klaran adreson kun 1 internacia respondkupono. Adr.: P.O. Box 111-8, Shenyang, 110044 Ĉinio.

* S-ro Renato Seifert dez. kor. tm., interesiĝas pri multaj landoj (precipe Islando, Norvegio), geografio, romantika poezio, historio kaj multaj diversaj temoj. Adr.: Bartolovci 87, 55252 Sibinj. Slavonski Brod, Jugoslavio.

* Liu Xiaozhe dez. interŝanĝi opiniojn kaj vidpunktojn pri politiko Esperante, angle, france kaj ĉine. Adr.: Xinjiang Tea & Animal By-Products Corporation, 830002 Ĉinio.



S-ro Liu Xiaozhe

* Zheng Anxiang, vicgubernestro de Yi'angubernio, volas kor. kun japanaj geesperantistoj pri kaligrafio. Adr.: Yi'an Xian Zheng Fu, 161500, Heilongjiang, Ĉinio.

* Aili Petri, 41-j., dez. kor. tm. Esperante, germane, angle, ruse, estone, kaj kolektas bk., pm., kaj pupojn. Adr.: Postkast, 118, 202500 Valga, Estonio, Sovetunio.

* Kelkaj skoltoj kiuj sekvis la kurson Esperanto organizitan de la "Federatie Open Scoutisme" en Belgio ĉeestos en la Ĵamboreo 1991 en Koreio.

Ili volas kontakti la aliajn skoltojn kiuj partoprenos en tiu Ĵamboreo por korespondi kaj aranĝi renkonton dum la Ĵamboreo. Skribu al la peranto de Skolta Esperanto Ligo en Belgio: S-ro A. Bouman, Driesdreef, 8, B 9030 Gent-Belgio.

* Malvina Bethania Drummond, 19-j. bankoficistino, fraŭlino, dez. kor. tm. pri ĉt. Certe respondos ĉiujn leterojn. Adr.: Avenida Piracicaba, 701, Ilha, 35.100, Governador Valadares (MG), Brazilo.

KUL

# Ding Jie sur scenejo

Teksto de **SUN GUOLIANG**
Fotoj de **LI CHUNGENG**

ĈE la unua vido mi neniel povas kunligi Ding Jie kun la titolo de juna dancistino. Ŝi estas tute ordinara. Ŝi ne estas tiel bela kiel aliaj knabinoj destinitaj por danca kariero. Tamen la 23-jara Ding Jie estas unuaklasa aktorino de la ensemblo sub la Pekina Danc-instituto.

Ŝia instruisto diris al mi: "Ding Jie estas ne tiel bela, tamen ŝi havas siajn proprajn trajtojn — ŝi bone scias prezentadon. Ŝiaj membroj estas diketaj, tamen ŝi ilin movas lerte. Ŝia lernado de la ludo verŝajne estas iom malrapida, tamen ŝi estas diligenta. Unuvorte, ŝia belo vidiĝas sur scenejo."

Kun dubo mi spektis ŝian dancon. La de ŝi ludita mongola danco "Plezuro" prezentis, kiel gaja kaj feliĉa estas la mongola knabino. La dancado ne estas tre malfacila, tamen bezonas lertan dancarton. Ŝia delikata prezentado impresas, ke ŝi estas mongola knabino.

Per simpla prezentado la tibeta danco "Horizonto" plurflanke esprimas la ĝojon, malfacilan batalon, amon kaj esperon de tibetanoj. Ĝi estas viveca historia bildo. Mi trovis, ke Ding Jie sur scenejo dancis ne per membroj sed per "koro", ŝia danco estas kortuŝa.

Ding Jie prezentis la antikvan ĉinan dancon "Reveno de Mulan" kiel grandiozan vervan epopeon. Per brava kaj flueca dancmovo Ding Jie plastike ludis la kuraĝan knabinon Hua Mulan, kiu militservis anstataŭ sia patro, alivestite kiel viro. Rigardinte la prezentadon, mi admiris, ke sur la scenejo Ding Jie estas vere brila, elstara nacia dancistino.

Kiam mi demandis Ding Jie, kiel ŝi lernas dancon, ŝi respondis: "Por sukceso de sia kariero oni devas venki diversajn malfacilojn kaj ne ĉagreniĝi pri la propra honoro kaj malhonoro."

Fakte, ŝia vivvojo ne estis glata. En 1985, kiam okazis la tutlanda danca konkurso, oni rekomendis ŝin al iu reĝisoro por ke ĉi tiu komponu por ŝi dancon por partopreni la konkurson, sed pririgardinte ŝin, tiu reĝisoro ĝentile rifuzis. Poste, dank' al la kuraĝigo kaj helpo de instruisto, ŝi havis eblecon prezenti la mongolan dancon "Plezuro" en la konkurso.

"Plezuro" estas rezerva programero de fama mongola dancistino. Ĉu povas bone danci ĝin la 17-jara Ding Jie, kiu estas lerta en vigla danco? Tamen ŝi mirigis ĉiujn rigardantojn per sia elstara lerteco kaj firma volo en penega ekzercado. Ŝi gajnis la trian lokon en la konkurso. Post tri jaroj ŝi gajnis la unuan lokon en la tutlanda danc-konkurso per la danco "Reveno de Mulan" komponita de ŝi mem. Tio multe kuraĝigis ŝin, kaj ŝi pli diligente sin ekzercas. Ŝi deziras pli multe danci kun alta artnivelo kaj profunda nacia spirito sur scenejo. ■


Sceno el kore-nacia spaddanco


Sceno el la danco "Virino de Hui'an"



Sceno el la danco "Horizonto"

## SANKTA LIBRO "LA DIO DE LA SUNO"

En la 17-a de junio 1990 oni trovis raran ksilografian libron priskribantan la sunan dion kaj lunan dion en Shennongjia de Hubei-provinco.

Sur ĝia fronta paĝo troviĝas ideografiaĵoj "Re-gravurita je la 11-a jaro de la erao Tongzhi" (1872). La libro havas 172 paĝojn kun proksimume 20 000 ideografiaĵoj. Ĝi enhavas kompletajn "La Dio de la Suno", "La Dio de la Luno" kaj "La Dioj de la Suno kaj la Luno". Koncernaj esploristoj opinias, ke ĝi estas nova grava trovo post la unua geneza epopeo de Ĉinio, "La Tempo de Mallumo" trovita en 1984 en la arbara regiono de Shennongjia. La nova trovo unuafoje liveris konvinkan pruvon por la popola literaturo pri la suna dio, totemo de la prauloj de la ĉina nacio.

La ĉina kultura majstro Guo Moruo (1892-1978), esplorinte antikvajn testudŝelajn kaj ostajn orakolajn skribojn de Ĉinio, konstatis, ke la prauloj de la ĉina nacio prenis la sunon kiel sian totemon. Sed li ne povis daŭrigi la sciencan esploradon pro manko de materialo de popola literaturo pri la suna dio. La trovo de "La Dio de la Suno", "La Dio de la Luno" kaj "La Dioj de la Suno kaj la Luno" en Shennongjia prezentis novan gravan materialon por esplori la civilizacian historion de la ĉina nacio.

Shennongjia estas origina loko de Ĉu-kulturo kaj unu el la luliloj de la ĉina nacio, kaj ankaŭ sankta loko de longtempa aktivado de Yandi Shennongshi, la suna dio de Ĉinio. Longperioda izoliteco faris la lokon karakteriza "kultura sfero de primitiva arbaro de Shennongjia". Sekve en la loko konserviĝis trezoroj de popola kulturo kiel "La Dio de la Suno".

## NISHAN — NASKIĜLOKO DE KONFUCEO

Nishan, 30 km. sudoriente de Qufu de Shandong-provinco, famiĝas kiel la naskiĝloko de la ĉina antikva edukisto Konfuceo.

La Konfucea Templo de Nishan konstruiĝis en la jaroj 954-960, poste estis plurfoje plivastigita kaj rekonstruita. La nuna templo konsistas el kvin kortoj kun 69 ĉambroj. En la templo estas la pordoj Lingxing kaj Dacheng, la halo Dacheng kaj la Dormoĉambro. Oriente estas Yushenghou-templo kaj Templo de la Dio de Nishan kaj okcidente — Lernejo de Nishan.

Nishan-monto havas ok belajn vidindejojn, nome la Montoj de Kvin Olduloj, la Arbaro Luyuan, la Rivereto de Saĝo, la Kaverno Kunling, la Kiosko por Rigardi la Riveron, la Valo de Harmonio, la Arbaro de Literaturista Virto kaj la Kaverno de Blanka Nubo. Venante al Nishan, oni povas vidi de malproksime la Montojn de Kvin Olduloj. La Arbaro Luyuan troviĝas ĉe la montpiedo de Nishan, nun tie estas Luyuan-vilaĝo. La nomo Luyuan de la vilaĝo signifas "originon de Lu-regno". Preterpasinte la vilaĝon kaj akvorezervejon kaj ĉirkaŭirinte la sudan montpiedon de Nishan, oni vidas la Rivereton de Saĝo. La loknomo aludas, ke la naskiĝloko de Konfuceo estas fonto de saĝo. Irante norden laŭ la okcidenta bordo de la rivereto, baldaŭ oni atingas Kunling-kavernon, kiu havas alian nomon Konfucea Kaverno. Mito diras, ke Konfuceo estis forĵetita de sia patro Shuliang He pro sia malbeleco. Tigrino buŝprenis lin en sian kavernon kaj mamnutris lin, poste la gepatroj reprenis lin hejmen. Ŝtona ŝtuparo kondukas al la Kiosko por Rigardi la Riveron, ĉar tie estis la loko, kie Konfuceo rigardis kunfluon de kvin riveretoj. Norden, tra la Konfucea Templo de Nishan, oni atingas la Ombran Valon de Harmonio, kiu iras de la sudo al la nordo.

## KIALOJ DE FRAŬLECO KAJ FRAŬLINECO

La censo de 1987 farita de la Ŝtata Statistika Buroo de Ĉinio al centono de la loĝantaro raportis, ke pli ol 11.3 milionoj da ĉinoj edziĝtaŭgaj vivas fraŭl(in)e. Inter ili 10 milionoj estas viroj, kiuj konsistigis 7.4% de la viroj en iliaj aĝoj, dum la fraŭlinoj nur 0.51%.

Kial ili ne volas edz(in)iĝi? Enketo asertis, ke psika kialo estas la ĉefa:

Ili estas ambiciaj kaj persistas en la tradicia vidpunkto "sin sukcesigi en la kariero antaŭ ol starigi familion". Plejparto de ili estas intelektuloj. Ekz., iuj sciencaj esploradoj postulas klopodon de pluraj, eĉ kelkdek jaroj, aŭ dumvivan klopodon. Ili dediĉas siajn plejpartajn energion kaj tempon al sia amata kariero, kaj ne havas tempon por konsideri pri sia edz(in)iĝo.

La dua kaŭzo estas mono. Edziĝo postulas grandan monsumon. Precipe en la lastaj jaroj, multaj gefianĉoj konkuris pri lukseco de la nupto, kaj elspezo por edziĝo fariĝis ĉiam pli granda. La granda elspezo estas malfacile pagebla por iuj neriĉaj junuloj, precipe tiuj en urboj.

Nemalmultaj gejunuloj plurfoje malsukcesintaj en amo estis grave vunditaj je la koro, tial ili fariĝis timemaj kaj hezitemaj kaj longe prokrastis la geedziĝon.

# Intervjuo kun karboministoj

Teksto de **DA WEI**
Fotoj de **MA QINGQUAN**



La aŭtoro (la tria de dekstre) en la hejmo de Xue Li

"Nun ne facilas fariĝi karboministo! Oni devas trapasi kvalifikiĝan kaj korpan ekzamenojn. Kia akra konkuro!" Tion diris al mi karboministo Xue Li en sia loĝejo el tri dormoĉambroj kaj unu gastoĉambro.

"En la aĝo de 17 jaroj mi komencis dorse elporti karbon en Mentougou-karbominejo de Pekino kaj, 20-jara, venis en Datong-karbominejon de Shanxi-provinco por kolekti karbon en ŝakto. Ili lace laboris en ŝakto malpura kaj danĝera. La labor-medio estis ege malbona."


Kiam la 54-jara Xue Li rememoris sian ministan vivon en la juneco, malsekiĝis liaj okuloj. Nun li estas estro de la labordivida sekcio de Xinzhou-karbominejo de la Datong-mineja Administra Buroo. En la pasintaj pli ol 30 jaroj li laboris kiel ministo, grupetestro, grupestro kaj estro de karbofosejo, kaj neniun tagon li forlasis la ŝakton. La labordivida sekcio estas gvida centro de la minejo kaj ĉiutage funkcias 24 horojn. Kie troviĝas problemo aŭ danĝero, tie aperas Xue. Li estas sperta en traktado de truhava plafono. La ministoj nomas lin kapabla riparanto de truhava plafono.

Liaj kapharoj jam griziĝis kaj lia bruna kvadrata vizaĝo montris la honestecon kaj sincerecon de Shanxi-anoj. Lia senĝena parolo kaj serena rido esprimis lian kontenton pri la vivo. Li havas 4 filojn, 2 filinojn kaj genepojn. Lia edzino Wang Ruihua estas simpla kaj kompleza. Post laboro en kuirejo ŝi silente ekstaris apude.

"Kiel edzino de ministo vi certe renkontis multajn malfacilojn, ĉu ne?" mi petis ŝin doni kelkajn vortojn.

Ŝi estis iom timida. Post momento ŝi diris: "Nenio dirinda! Mia edzo tutkore laboras en la minejo. Mi, kamparanino, prenis sur min ĉiujn hejmlaborojn. Mi ne lasis lin aĉeti grenon eĉ unufoje. Nun ni uzas brulgason kaj kranakvon, kiuj multe oportunigis al ni la vivon. Antaŭe en ŝakto ofte okazis akcidento, kaj mi ofte estis maltrankvila pro la edzo. En la lastaj jaroj la minejo alprenis multajn rimedojn por garantii sekurecon al la ministoj. La ŝakto do ne estas danĝera."

S-ro Xue daŭrigis: "En la 60-70-aj jaroj, kiam mi funkciis kiel grupestro, la minejaj plafonoj estis apogitaj per lignaj fostoj, kaj ekipaĵoj de karbokolektado estis postiĝintaj, labor-intenso granda kaj laborakcidentoj multaj. Nun kolektado kaj transportado de karbo estas plenumataj per maŝino, la minejaj plafonoj estas apogitaj per hidraŭlika ekipaĵo kaj en la ŝakto oni instalis gaso-kontroliston kaj alarmilon kaj sur la tero telemezuran aranĝaĵon, kio multe malpliigis akcidentojn en la ŝakto. En la 80-aj jaroj oni donis grandan atenton al la sano de la ministoj. Oni malpermesis rekte fari truon




Karbominejo en la Lanterna Festo



En laboratorio de la karbominista universitato



En ĝardeno ĉe ŝakto



Karbministoj rigardas historiajn restaĵojn.





Biblioteko de la karbminista universitato



Karbominista familio

kaj starigis en la galerio kontraŭpolvan akvokurtenon, kiu multe malpliigis karbopolvon en la galerio kaj bonigis la labormedion en la ŝakto."

Kun la ŝanĝiĝo de la mineja aspekto, pli kaj pli profundiĝis la amo inter Xue kaj la minejo. Liaj filo kaj bofilino diris al mi, ke ĉiutage je la 6-a h. matene Xue iras al laboro kaj revenas hejmen je la 7-8-a h. vespere. Li estas ege okupita de laboro.

Same kiel li, preskaŭ ĉiuj liaj familianoj laboras en la mineja distrikto. Lia unua filo estis ministo kaj nun laboras en sekurkontrola stacio de la minejo. La dua estas ŝoforo de mineja ambulanco. Ĵus sukcesinte en ekzameno, la tria fariĝos karboministo, kaj la kvara okupiĝas pri geologia mezurado en ŝakto de alia karbominejo. Liaj filinoj kaj bofilinoj laboras en manĝejo, malsanulejo kaj lernejo por ministoj aŭ ministaj gefiloj. Lia edzino laboras kumule kiel barbiro por junaj ministoj. Liaj genepoj vizitas infanĝardenon kaj lernejon en la mineja distrikto.

Inter la ordinaraj familioj de Ĉinio lia familio estas bonhava. Liaj ĉambroj estas meblitaj per ŝrankoserio, sofoj, kolora televidilo, fridujo, telefono k.a. "Ĉu vi havas bonan salajron?" mi demandis lin.

"Ĉiumonate mi enspezas pli ol 300 juanojn."

"Kiom da mono ricevas aliaj ministoj?"

Xue diris al mi, ke en la lastaj jaroj Xinzhou-karbominejo praktikis rimedon dividi laboron en tri klasojn: La unuaklasa estas karbokolektado en ŝakto, la dua — helplaboro en ŝakto kaj la tria — laboro sur la tero. La salajro por la unuaklasa laboro estas la plej alta, t.e. ĉ. 500 juanoj ĉiumonate. Tiuj por la dua- kaj triaklasaj — malpli altaj. Tiel estas multe da ministoj de la unua- kaj duaklasaj laboroj kaj ne sufiĉas laboristoj de la tria. Krome, la minejo tre atentas ankaŭ la bonstatigon de la laboristoj. Antaŭe la laborvestoj de ministoj estis konservataj de ili mem. Multaj vestoj estis malpuraj kaj ĉifonaj. Pro tio oni starigis vestotenejon kaj instalis prizorgantojn por lavi kaj fliki laborvestojn. Ankaŭ la ekipaĵoj de la banejo, manĝejo kaj loĝejo estis plurfoje plibonigitaj.

Pri la problemo de loĝdomoj Xue diris: "Antaŭe nia familio luis teretaĝan domon de kamparano. En 1982 la minejo loĝigis nin en tiu komforta apartamento. La monata pago por domo, akvo kaj elektro estas nur dekkelkaj juanoj. Miaj gefiloj jam havas sian familion."

La gastama mastro prezentis al mi bongustan akvomelonon, kies bonodoro plenigis la ĉambron.

Forlasinte la domon de Xue Li, mi venis al kvartalo de teretaĝaj domoj ĉe la monttalio. Tie mi vizitis la familion de ministoteknikisto Cao Wen. Lia domo kovras nur dekkelkajn kvadratajn metrojn. La terlito jam okupas pli ol duonon de la areo, kaj ĉe la pordo estas kuirforno kaj en aliaj lokoj de la domo ŝranko kaj tablo. La 55-jara Cao Wen laboras en la tria grupo de sinteza karbokolektado. Li havas du filojn kaj du filinojn. Nuntempe unu filo kaj unu filino vivas ĉe li kaj lia edzino. La gefiloj loĝas en dometo de 6 kvadrataj metroj konstruita de Cao.

En Xinzhou-karbominejo troviĝas preskaŭ duono de la laboristoj, kies loĝejoj estas samaj kiel tiu de Cao. Li diris al mi, ke ĉi-jare la minejo havigis al li apartamenton el du ĉambroj. Tamen li cedis ĝin al sia unua filo, elementlerneja instruisto, kiu baldaŭ edziĝos. Li aĉetis por li koloran televidilon, fridujon, ŝrankoserion k.a. Kvankam ĉiujare la minejo konstruis novajn loĝdomojn, tamen multaj maljunaj laboristoj cedis la loĝdomon al siaj plenkreskaj gefiloj. S-ro Cao ĉiumonate enspezas ĉ. 500 juanojn kaj estas kompare riĉa, tamen li ankoraŭ vivas modestan vivon pro la amo al siaj gefiloj.

Por pli multe koni la vivon de ministoj, mi intervjuis Zhang Baoshan, direktoron de la minejo. Li konigis al mi, ke Xinzhou-karbominejo ĉiujare produktas pli ol 2.4 milionojn da tunoj da karbo. Nun ĝi havas pli ol 6 000 laboristojn kaj oficistojn. Ĉar ĝi emfazis sekuran produktadon, de 1989 ĝis nun neniu ministo mortis aŭ grave vundiĝis de akcidento. Por fari interesa la postlaboran vivon de la ministoj, oni starigis multajn amuzajn ĉambrojn por la laboristoj kaj oficistoj. Ĉiujare la minejo vojaĝigas aliloken 25% de la laboristoj kaj oficistoj por ferii. Kvankam la pokapa loĝ-areo ankoraŭ ne atingis 6 kvadratajn metrojn, tamen jam pli ol 2 000 familioj transloĝiĝis en novajn domojn. La emeritoj ĝuas pension senrabate kaj senpagan kuracadon. ■

# Ŝminkitaj vizaĝoj de herooj de "Ĉe la Akvorando" en pekina opero

de **CAO WEI**

MENCIANTE pekinan operon, oni neniel forgesas bunte ŝminkitajn vizaĝojn. Ĉe la surscieniĝo de la aktoroj iliaj dense kolorigitaj kaj bele ornamitaj vizaĝoj povas ĝuigi la spektantojn, tamen por malnovaj spektantoj ili signifas multon. Koncerne la kolorojn de la vizaĝa fono en la operoj, vidiĝas vizaĝoj blanka, ruĝa, blua, verda, flava, ora kaj arĝenta, kaj ĉiu el ili montras apartan temperamenton de la rolo.

Multaj fragmentoj el la ĉina klasika romano "Ĉe la Akvorando" estis surscenigitaj en pekina opero. Tiu romano priskribanta la kamparanan revolucion en la Norda Song-dinastio (960-1127), kiu prenis Liangshan-monton kiel sian bazlokon, estas enhavoriĉa. En ĝi viglas multaj herooj. Kun malsamaj karakteroj en pekina opero ili havas malsamajn ŝminkitajn vizaĝojn impresantajn klare kaj profunde.

Li Kui estas heroo kun aparta karaktero. Lia figuro vidiĝas en multaj teatraĵoj, ekz. "Li Kui Vizitas Sian Patrinon" kaj "Xunyang-turo". Li, forta kaj nigravizaĝa, honesta kaj brava, ĉiam portis paron da toporoj kiel batalilon. Li, ŝercnomata "Nigra Bravulo", la unua sin pafis al la ekzekutejo, svingante la toporojn, por savi Song Jiang, amikon de la ribelantoj kaj ilian estontan gvidanton. Kiam oni diris al li, ke Song Jiang rabis virinon, li levis tumulton en la monto, ne konsiderante sian profundan amikecon kun Song. Li Kui ĉiam kun nigra vizaĝo viglas sur la scenejo de pekina opero, ĉar en la okuloj de la ĉinaj spektantoj nigro simbolas honestecon.

Weng Ouhong kaj Tian Youliang




Ankaŭ Yang Zhi estas heroo ofte vidata en pekina opero. Li, posteulo de fama generalo Yang Ye de Song-dinastio, estis eksigita pro malplenumo de la ofico kaj vagis en Kaifeng, la ĉefurbo de la Norda Song-dinastio. Tute ekster sia atendo li renkontis surstrate kanajlon, kiu rabis lian glavon. En kolerego li mortigis la kanajlon kaj pro tio estis ekzilita. Post nelonge li faris eraron en eskorto de naskiĝtagaj donacoj kaj povis fari nenion alian krom suriri la vojon de ribelo. Ĉar li estis flamiĝema, oni pentris lian vizaĝon verda.

La interrilatoj inter la teatra ŝminkado kaj homa karaktero ne estis fiksitaj en la komenco, sed formiĝis post longatempa praktikado.


Ĝenerale oni opinias, ke la vizaĝa ŝminkado de herooj de la romano "Ĉe la Akvorando" en pekina opero devenis de maskoj same kiel en aliaj operoj. La maskoj similas al tiuj en la teatro de la antikva Grekio, kiuj kiel eble plej multe troigas la vizaĝan formon por subĉiela prezentado. Ĉar ili ne povas montri la esprimriĉan mienon de homoj, tial oni kolorigas sian vizaĝon, kaj iom post iom formiĝis la aparta ornama arto.

La nuna majstro pri vizaĝa ŝminkado de pekin-operaj aktoroj estas la 81-jara sinjoro Weng Ouhong, kiu sin ekokupis pri pekina opero antaŭ 60 jaroj. Pli-ol-10-jara, li jam forte interesiĝis pri vizaĝoj en pekina opero. Li ne nur kolektis kaj studis diversajn specojn de vizaĝa ŝminkado en pekina opero, sed ankaŭ havas sian propran konon pri iliaj naskiĝo, pozicio, rolo kaj klasifiko. Li jam kolektis 50 bildojn de ŝminkitaj vizaĝoj de herooj de "Ĉe la Akvorando" en pekina opero. En la lastaj jaroj, gvidate de li, lia disĉiplo Tian Youliang skizis kompleton da ŝminkitaj vizaĝoj de la herooj de "Ĉe la Akvorando". Tiu laboro ne nur estas utila por konservi tiun antikvan ornaman arton, sed ankaŭ montras, ke la vizaĝa ŝminkado de la opero faris ĝojigan paŝon al pentrarto. ■




Ŝminkita vizaĝo de Li Kui


Ŝminkita vizaĝo de Shi Qian






Ŝminkita vizaĝo de Fan Rui





Ŝminkitaj vizaĝoj de herooj de "Ĉe la Akvorando"




Ŝminkita vizaĝo de Yang Zhi

Ŝminkita vizaĝo de Qin Ming




Ŝminkita vizaĝo de Lu Zhishen



# Urbo kun

ANTAŬE tie etendiĝis nur Gobio. En la vastega areo troviĝis nenia objekto, kiu povis inspiri nomdonon de la loko. Poste oni malkovris tie valon de rulŝtonoj, kvazaŭ rivero kun rulŝtona fluo. Tial ĝi ricevis la nomon Shihezi (ŝtona rivero).

## SONĜO DE CENT JAROJ

Shihezi, kiu tuŝas Tianshan-montaron sude kaj Junggar-basenon norde, rigardas al la vastega dezerto Gurbantunggut. La maljuna rivero Manas fluas preter ĝi. La antikva kaj mistera sablomondo prezentas fikcion: Antaŭe tie sidis kvadrata kastelo Xiying. Oriente de ĝi estis kastelo Maqiao. Inter la du kasteloj staris alarma signala turo alta pli ol 30 m. Sub la turo estis abisma baseno, en kiu brilis ĉarma ora luno, kiel la luno sur la ĉielo. Ĝi protektis la tieajn kamparanojn. Sed poste, katastrofa sablovento englutis la turon kaj ankaŭ la oran lunon, kaj ruiniĝis la kastelo.

En 1876 revizoro Zuo Zongtang de Qing-dinastio kaj lia armeo venis en la lokon por sufoki ribelon kaj poste garnizonis tie. Oni diris, ke tiam li priplantis per arboj la lokon kun areo de miloj da kvadrataj kilometroj, tamen Gobio kruele detruis liajn kazernojn, forglutis la arbojn kaj forvaporigis lian idealon verdigi la lokon. En Mosuowan pli ol 50 km norde de Shihezi sidas ruinoj de tri antikvaj urboj Dongfu, Xifu kaj Xiying, la kampadejoj de Zuo Zongtang. Tio pruvis al ni, ke antikvuloj faris heroaĵon por subigi la dezerton, sed bedaŭrinde, ili malvenkis. Zuo Zongtang havis sonĝon, ke li brakumis la oran lunon.

En 1950 alia armeo, nome trupoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, venis al la loko por ekspluati la virgan teron kaj garnizoni tie. Ilin sekvis aro post aro da homoj el diversaj partoj de Ĉinio. Ili estis armeanoj, studentoj, sciencistoj, teknikistoj, fuĝantaj kamparanoj kaj ankaŭ liberigitaj krimuloj. En primitiva maniero ili plugis teron. Ili havis la saman sonĝon de Zuo Zongtang, sed io diferenca estis, ke ilia sonĝo estis realigita.

## LA VOJO DE PIONIROJ

La vojo de pioniroj estis dorna.

En 1951 armeano Hou Zhengyuan venis ekspluati virgan teron en Xinjiang. Rememorante la tiaman vivon, li diris kun emociiĝo: "Tiam Shihezi, regno de fragmitoj kaj marĉoj, estis frekventata de rabobestoj. La loko estas vasta, akvoriĉa kaj ebena. Sterniĝis centmiloj da hektaroj da virga tero. Konsidere al tio, la ĉina registaro decidis starigi tie kultivejon." Same kiel multaj aliaj, Hou Zhengyuan loĝis en

Parto de la urbo



La familio de Hou Zhengyuan



malluksega kaj malseka kabaneto kaj entuziasme ekspluatis la virgan teron, malgraŭ vento kaj neĝo. Tamen, fortuno venis al li pli frue ol al aliaj. Post nelonge li estis sendita lerni konduki traktoron kaj fariĝis membro de la unua generacio da traktoristoj de Ĉinio. Tiam ilia energio estis neelĉerpebla. Ili povis labori sinsekvajn tagnoktojn. Kie ili plugis, tie ili fosis en tero por si kuŝejon. Foje li maldormis tutan nokton aŭdinte hurlon de lupo.

Estis tiuj pioniroj, kiuj faris fekundan kampon el dezerto kaj konstruis novan urbon sur Gobio. Nun la urbo havas 550 000 loĝantojn, 18 grandajn kaj mezgrandajn ŝtatajn kultivejojn kaj brutobredejojn kaj industriajn entreprenojn kun tekstilado, manĝaĵpreparado kaj paperfarado kiel la ĉefaj. La jara produktovaloro de industrio kaj agrikulturo superas miliardon da juanoj. Ĉie en la urbo disvolviĝas floroj. Ĉe stratoj staras altaj poploj kaj vidiĝas domoj unuj post aliaj. Hospitaloj, lernejoj, magazenoj, teatroj, kinejoj, balejoj, bibliotekoj... nenio mankas. Agrablas freŝa aero kaj kvieteco. Iu junulo el Urumqi kontente diris: "Vivi en Shihezi estas pli komforte ol en aliaj lokoj."

Ankaŭ pioniroj havas sian malĝojon kaj bedaŭron. Wang Lingyuan estas virino mezaĝa, kun vangoj freŝrozaj. En 1965 ŝi venis al Xinjiang kaj laboris kiel infanĝardenistino kaj nun ŝi okupiĝas pri kamplaboroj. Ŝia edzo estas Henan-provincano kaj laboras

# malvarma nomo

Teksto de HU YUN Fotoj de LIU SIGONG

en semostacio. Ili havas tri filinojn, du laboras kaj la tria vizitas lernejon. Ŝi estas kontenta pri siaj edzo kaj filinoj, sed je mencio de siaj gepatroj kaj gefratoj, kiuj loĝas en la fora Ŝanhajo, ŝi ekhavas karmemoron pri ili kaj larmoj ruliĝas el ŝiaj okuloj.

Liu Shuiqing, kiu venis el Ŝanhajo, laboras en la Shihezi-a Lantekstila Fabriko. Mi informiĝis de li pri lia malagrablaĵo. Antaŭ kelke da jaroj li ricevis telegramon pri la grava malsaniĝo de sia patro kaj li petis forpermeson de la fabriko. Sed kiam li atingis Ŝanhajon post trajnveturado de tri tagoj kaj kvar noktoj, lia patro jam forpasis. Kia bedaŭro!

Tamen ili bone komprenis la devon de ekspluatanto kaj, liberiginte sin el ĉia amareco, dediĉis sian junecon al la ekspluatado de Shihezi.

## POPLOJ MERITOPLENAJ

Ĉie en la urbo kreskas ĉielskrapantaj poploj. Ili estas tre ŝatataj pro sia rezisto kontraŭ malvarmo, sterileco kaj sablovento. Oni kalkulis, ke la totala longo superos la perimetron de la tero, se oni vicigas la tieajn arbojn kun interspaco de unu metro. Kia grandioza laboro!

Jam ĉe la komenco de la ekspluatado oni prenis forstumadon kiel unu el la ĉefaj laboroj. En la pasintaj 40 jaroj oni arbarizis en Shihezi 10 400 hektarojn da tero kaj 29.37% de la urbareo estis verdigitaj. La antaŭa dezerto nun vestiĝas per verdaĵo.


Pluraj kultivejoj en Mosuowan antaŭiris en forstumado. Mosuowan tuŝas dezerton norde. Ĉiufoje, kiam leviĝis ventego, la ĉielo pleniĝis de sablo. Grenplantoj kaj domoj estis superŝutitaj de sablo. En 1959 kaj 1960 la plantitaj arboj de la kultivejoj ankoraŭ estis junaj kaj dekmiloj da hektaroj da grenplantoj estis forbalaitaj de sablovento. De tiam la Mosuowan-anoj decidis forstumi laŭeble por venki sabloventon. Post dekoj da jaroj formiĝis kampoŝirmaj forstoj, kiuj lojale protektas la kampojn. En 1983 ventego denove atakis Mosuowan, sed dank' al la forsto, oni ankoraŭ akiris riĉan rikolton de greno en vasta areo.

La forsto Fengshou sterniĝas plej antaŭe de la kampoŝirmaj forstoj de Mosuowan. Ĝi longas 7 km kaj larĝas 24 m. Tie kreskas multaj arbospecoj, kiaj poplo, ulmo, jujubarbo kaj paŭlovnio. Ili formas plurajn kurtenojn ĉe la rando de la dezerto. La forsto, en la okuloj de alilandanoj, estas miraklo. Oni diras, ke ili observis ĝin per arta satelito.


## SEZONO DE RIĈA RIKOLTO

Ora aŭtuno. Disvolviĝas blankaj floroj de kotono kaj elkreskas ruĝaj kvastoj de maizo. La loĝantoj de Shihezi ĝojis pro la riĉa rikolto. Eĉ lernantoj venis helpi kamparanojn.

Ekster la koton-aĉeta stacio de la kultivejo Dongfucheng staris en longa vico veturiloj kun kotono por vendi. La kotonmasoj en la stacio aspektis kiel montetoj. Estro de la kultivejo Zhang Xueyi diris al mi, ke en la pasinta jaro la kultivejo kultivis 4 600 hektarojn da kotono. La hektara produktokvanto atingis 1 125 kg., kaj la totala rekorda produktokvanto estis 5 500 tunoj.



Shihezi



En sia kotonkampo 29-jara virino Li Chunling el Shandong-provinco konigis al mi, ke ŝi laŭkontrakte kultivis proks. 3 hektarojn da kotono. Antaŭe ŝi ne kuraĝis tion fari. Poste ŝi kuraĝigis sin, ke ŝi povas fari tion, kion aliaj povas. En 1989 ŝi bone profitis de la laŭkontrakte prilaborita kampo. En 1990 ŝi profitis pli bone.

La kultivantoj ĉiuj deziras, ke riĉa rikolto rekompencu ilian penadon. Vizaĝe al la riĉa rikolto, ridis Li Chunling, ridis la urbo Dongfu kaj ridis ankaŭ la tuta urbo Shihezi. ■





Ludo ĉe strato



Apud fabrikdomo

Tomatoj prilaborataj





Studentoj faras patologian eksperimenton.

Rikolto de tritiko



## KURANTAJ AFEROJ

### EKONOMIO

● La produktokvanto de someraj grenoj kaj frua rizo de Ĉinio en 1990 pliiĝis je pli ol 8.4 miliardoj da kg kompare kun tiu en 1989. La totala produktokvanto de greno en 1990 superis 420 miliardojn da kg.

● En Ĉinio la entreprenoj investitaj de alilandaj komercistoj jam eniris en profitodonan etapon post dekjara disvolviĝo. La pli ol 1 900 entreprenoj ekfunkciigitaj en 1986 administrataj kaj investitaj de Ĉinio kaj alilandaj komercistoj kune pagis al la ŝtato imposton de pli ol 900 milionoj da juanoj en la sama jaro, inter ili la profitodonaj entreprenoj gajnis profiton de miliardo da juanoj. Ĝis la jarfino de 1989 la 6 221 entreprenoj investitaj de alilandaj komercistoj pagis al Ĉinio imposton de 4.88 miliardoj da juanoj, inter ili la profitodonaj entreprenoj gajnis profiton de 3.74 miliardoj da juanoj. En la kvar jaroj la imposto kaj profito kvarobliĝis.

● La unua surmara olekampo de Ĉinio, kiu ĉiujare povas produkti milionon da tunoj da oleo — Huizhou-a Olekampo 21-1 en la Suda Ĉina Maro — ekfunkciis kaj ekproduktis oleon en la lasta septembro.

● Ĉinio jam eniris en la vicon de la ĉefaj ŝipfaraj landoj de la mondo. Ankaŭ ĝia ŝipprojektado atingis la avangardan nivelon de la mondo. La Ŝanhaja Jiangnan-ŝipfarejo projektis kaj konstruis 65 300-tonelan bonan lozkargoŝipon kun multaj instalaĵoj faritaj de Ĉinio. Pro tio ĝi estas laŭdata de alilandaj navigaj kompanioj kiel "Jiangnan-tipo de Ĉinio". La ŝipfarejo ricevis alilandajn mendojn pri 8 ŝipoj kun totala kapacito de 500 000 toneloj. Sole en la unuaj 6 monatoj de 1990 Ĉinio ricevis alilandajn mendojn pri 6 grandaj cisternoŝipoj ĉiu kun kapacito de 40 000-95 000 toneloj, kiuj estas konstruataj ekskluzive laŭ la skizoj faritaj de Ĉinio mem.

● En la pasintaj pli ol 10 jaroj la ŝtataj kultivejoj de Ĉinio faris integran reformadon al siaj produktado, prilaborado kaj vendo, konstruis industriajn entreprenojn, kies produktovaloro konsistigas 60% de la totala valoro kaj fondis 75 000 komercejojn. Ilia jara vendokvanto superis 10 miliardojn da juanoj kaj la totala valoro de iliaj eksportaĵoj atingis 2.88 miliardojn da juanoj. Tio markis malaperon de la plurjara deficito kaŭzita de sola grenoproduktado.

● La okcidenta parto de la Lanzhou-Xinjiang-a Fervojo de Ĉinio trakoligiĝis kun fervojo de Sovetunio je la 12-a de septembro 1990. Estas transdonita al trafiko tiu "dua eŭrazia ponto".


● Laŭ statistiko la nombro de kortobirdoj bredataj de Ĉinio en la lastaj jaroj atingis 2.2 miliardojn, pliiĝis je 1.85 obloj kompare kun tiu en 1978 kaj okupas la unuan lokon en la mondo. La jara produktokvanto de kortobirdoj superas 7 190 000 tunojn kaj la pokapa kvanto atingas 6.3 kg kaj proksimiĝas al la meznombra kvanto de la mondo — 6.9 kg.

### SCIENCOJ KAJ TEKNIKOJ

● La 30-a scienc-sonda satelito lanĉita de Ĉinio sukcese surteriĝis post 8-tagaj rivoluoj. La satelito portis eksperimentaĵojn, inkl. de animaloj, plantoj kaj materialoj, kaj oni akiris grandan kvanton da eksperimentaj donitaĵoj. Ĝis nun Ĉinio lanĉis sume 12 repreneblajn satelitojn kaj sukcese reprenis ilin ĉiujn.

● Ruĝa ibiso, unu el la plej raraj birdoj en la mondo, estas arte generita kaj sukcese bredata en la Pekina Zoo. La birdido post 90-taga bredado pezas 1 400 g.

La nove ligita trako inaŭgurita



En la teatro Liyuan



## KULTURO

● Eldoniĝis "Elektitaj Sonetoj de Ĉinio (1920-1987)" kompilita kaj komentita de Qian Guangpei, esploristo de la Pekina Soci-scienca Akademio. Ĝi estas la unua elektita verko de ĉinaj sonetoj eldonita de Ĉinio. En ĝi legiĝas 270 sonetoj, verkitaj de 58 modernaj ĉinaj poetoj, kaj apendico "Ĉinaj Poetoj pri la Sonetoj". La libro spegulas la evoluon de la sonetoj, mondsfera poema formo en Ĉinio, kaj apartan kontribuon de ĉinaj poetoj al la disvolviĝo de la sonetoj.

● En la 11-a Azia Sportkunveno ĉinaj artistoj ambaŭborde de Taiwan-markolo sukcese prezentis la mondfaman operon "La Traviata". Ĝi estis direktita kaj reĝisorita de prof. Zeng Daoxiong, opera reĝisoro de Taiwan, Gao Weijun kaj Wen Haifeng de la Centra Operejo de Pekino. Taiwan-a sopranulino fraŭlino Lü Yihui ludis la ĉefan rolon. Tio estis refoja sukcesa kunludo de artistoj ambaŭborde de la markolo post la opero "Damo Papilio".



Sceno el la opero "La Traviata"

## HIGIENO

● En la lasta censo oni trovis, ke en Zhongxiang-gubernio de Hubei-provinco vivas 46 pli-ol-centjaruloj, el kiuj la plej aĝa estas 111-jara. Iliaj komunaj trajtoj estas ne fumi, nek drinki, kaj vivi en harmonia familio. Krome, ili plejparte vivas en monta kaj rivervala regiono abunda je fosfora erco.

## TURISMO


● La pekina opero estas nacia opero de Ĉinio kaj ĝuas renomon en la mondo. Multaj alilandaj turistoj deziras apreci ĝin. Sed en la pasintaj jaroj en Pekino mankis speciala teatro por prezenti ĝin, pro tio estas malfacile por alilandaj turistoj rigardi ĝin. La teatro Liyuan ekfunkciigita antaŭ nelonge en Pekino estas speciala por prezenti la pekinan operon. Tie oni eksponas ankaŭ kostumojn, ornamaĵojn, bildojn de ŝminkitaj vizaĝoj kaj rekvizitojn de la pekina opero. Pro ĉio ĉi tio ĝi servas kiel bona loko por koni la pekinan operon.


## INTERESA AFERO

● Nun estas eksponata miljara viva testudino en Kantono, Ĉinio. Tiu testudino peza je 9 kg kaj longa je 37 cm vivas en la Guangxi-a Ĝŭang-nacieca Aŭtonoma Regiono. Ĝia antaŭa parto estas normala, sed en ĝiaj meza kaj posta partoj vidiĝas klara signo de premado kaj ĝia ŝelo estas iom korodita. Fakuloj asertis, ke ĝi naskiĝis en la lastaj jaroj de Tang-dinastio (618-907) kaj vivis 500 jarojn sub montaj rokegoj.




Ruĝa ibiso





# MIRINDAĴOJ DE ĈINIO

Fotoj de **WU XINHUA**



Ĉu li faras akrobataĵojn? Ne. Li nomiĝas Fang Zhongyu, 64-jara te-trinkeja kelnero de Sichuan. Li laboris 50 jarojn kaj fariĝis mirinde lerta en servado. Admirindas, ke li verŝas teon el du kruĉoj samtempe kaj kolektas teservicon fulmrapide.

ANTIKVAJ ĈINAJ FILOZOFOJ

# Filozofo pledanta por interamo

de **HOU JUELIANG**

MI memoras, ke en mezlerneja leciono instruisto de fiziko menciis Mozion, kiam li instruis optikon. Li diris, ke en la antikva Ĉinio troviĝis erudiciulo Mozio, kiu faris elstaran esploradon pri optiko, geometrio, logiko kaj filozofio. Aŭdinte tion, mi ekhavis respekton al Mozio.

Poste, en supera mezlernejo mi legis rakonton pri tio, kiel Mozio malhelpis Chu-regnon ataki Song-regnon. Mi tre admiris la saĝon kaj kuraĝon de tiu erudiciulo. Jen la rakonto: En la 5-a jc. a.K. Ĉinion dividis feŭduloj, kiuj okupis po unu terenon kaj atakis unu alian. La regno Chu situanta en la meza baseno de Yangzi-rivero estis lando kun vasta teritorio kaj multaj loĝantoj. Por ataki sian nordan najbaron Song-regno kun malgranda teritorio kaj malmultaj loĝantoj, la reĝo de Chu-regno ordonis lertan metiiston Gongshu Ban projekti kaj fari novan urboatakan instrumenton — eskalon.

Informiĝinte pri tio, Mozio tuj forlasis sian hejmon kaj iris piede dek tagojn, spite al vojaĝaj suferoj, por atingi la malproksiman Chu-regnon. La elokventa Mozio rakontis: "Estas homo, kiu havas luksajn veturilojn kaj tamen intencas ŝteli kadukajn ĉarojn de la najbaro; kiu havas brokatajn vestojn kaj tamen intencas ŝteli la krudŝtofajn de la najbaro; kiu havas bongustajn manĝaĵojn kaj tamen intencas ŝteli la feĉajn de la najbaro." Li demandis: "Kia homo li estas laŭ via opinio?" La reĝo de Chu-regno respondis: "Certe ŝtelema." Mozio tuj montris malkaŝe, ke se Chu-regno atakos Song-regnon, oni vidos, ke granda lando invadas malgrandan, forta lando prirabas malfortan, kaj la reĝo de Chu-regno kondutas same maljuste kiel tiu ŝtelema rabisto, kiu ŝtelas kadukajn ĉarojn, krudŝtofajn vestojn kaj mizerajn manĝaĵojn de la najbaro. La reĝo mutis, konvinkite de Mozio. Sed li ne rezignis sian intencon invadi Song-regnon, dirante, ke Gongshu Ban jam faris por li eskalojn, kaj oni devas uzi ilin. Tiam Mozio malligis sian zonon kaj faris el ĝi cirklon simbolantan urbomuron kaj prenis manĝbastonetojn kiel defendajn armilojn. Li petis, ke Gongshu Ban ataku. Post 9 fojoj la operacio finiĝis per la fiasko de Gongshu Ban. Tute senpova kontraŭ la saĝa Mozio, Gongshu Ban intencis mortigi lin. Mozio jam legis sur lia vizaĝo la fiintencon kaj aplombe diris: "Ne gravas, ke oni min mortigos! Miaj 300 disĉiploj jam gardas sur la urbomuroj de Song-regno. Ĉiu el ili jam ellernis mian metodon." La reĝo de Chu-regno konkludis, ke lia agreso kontraŭ Song-regno ne sukcesos, li do diris vole nevole: "Prave vi diris, mi do ne atakos Song-regnon!"



Portreto de Mozio

Ne estis hazardo, ke Mozio malhelpis Chu-regnon ataki Song-regnon, kio intime rilatas kun lia doktrino.

Mozio naskiĝis en la jaro 468 a.K. kaj mortis en la jaro 376 a.K. Li devenis ne de prospera familio kaj mem diris, ke li estas "malriĉulo". Li ne estis ŝtatoficisto nek kamparano. Li estis intelektulo el la ordinara popolamaso kaj havis naturajn rilatojn kun ordinaraj laboruloj, tiel li multe konis la mizeron de la popolo. Li bone konis la tri suferojn de la popolo: manko de manĝaĵo dum malsato, manko de vesto en malvarmo kaj manko de ripozo post laboro. Lia penso kaj doktrino spegulis postulojn kaj dezirojn de la laboruloj. Oni povas diri, ke li estis proparolanto de la laboruloj. Antaŭe li kune kun disĉiploj de Konfuceo studis konfuceanismon. Poste li trovis ĝin skolastika kaj forlasis ĝin. Li private funkciigis lernejon kaj fariĝis fondinto de moziismo. Moziismo kaj konfuceanismo estis kontraŭstaraj. Iliaj doktrinoj havis grandan socian influon kaj estis nomataj "Famaj Doktrinoj". La moziisma skolo estis akademia organizo kun strikta strukturo, kiu daŭris generacio post generacio kaj en ĉiu generacio elektis por si erudiciulon kiel gvidanton nomatan "Giganto". Mozio estis la unua "Giganto". La moziistoj havis komunajn karakterizaĵojn: Ili observis la disciplinon de sia skolo, agis unuanime, batalis

sentime por defendi la justecon; ili portis krudŝtofajn vestojn kaj pajlajn sandalojn kaj penige laboris, kaj interne de la skolo regis harmonio kaj amikeco — ili helpis unu alian, juste dividis inter si posedaĵon kaj instruis sin reciproke. Post la forpaso de Mozio la moziisma skolo dividiĝis en tri sektojn kaj malaperis en la 2-a jc. a.K. pro tio, ke la feŭdaj regantoj sekvis nur konfuceanismon. Nur en la komenco de la 20-a jc, kiam leviĝis la demokratia revolucio en Ĉinio, la moziisma doktrino revidis la lumon. Mozio verkis sume 71 traktatojn. Bedaŭrinde, multaj el ili perdiĝis. Nun restas la libro *Mozio,* kiu estis verkita de pluraj personoj en malsamaj periodoj, tamen oni povas rigardi ĝin kiel kolekton spegulantan la moziisman penson.

La filozofia penso de Mozio iom diferencas de tiu de Konfuceo. En la doktrino de Konfuceo regas la penso pri "humaneco". Li ŝatis paroli pri "hom-amo", anstataŭ pri "praktika utilo". Tial lia doktrino pri humaneco estis proksima al malplena parolo. Tia doktrino neniom koncernis la realajn interesojn de la laboruloj. Post Konfuceo aperis instruitulo Yang Zhu. Anstataŭ pri humaneco li publike parolis pri praktika utilo kaj propagandis la filozofion de egoismo. Laŭ li, ne necesas eĉ "eltiri unu el siaj haretoj por utili al aliaj". Li pledis por la filozofio de "nuda egoismo", por ke la ekspluatatoj konsideru siajn interesojn, sian propran materialan vivon kaj ne donu ĉiujn siajn laborfruktojn al la ekspluatantoj. Pro tio, la egoisma filozofio de Yang Zhu havis econ kontraŭ la feŭdisma ekspluatado. Mozio diferencis kaj de Konfuceo kaj de Yang Zhu, ĉar li pledis kaj por humaneco kaj por praktika utilo, kombinante ilin en unu tuton. Li starigis sian propran doktrinon — moziismon — kun teorio de "utilo" kiel bazo. Anstataŭ "paroli apenaŭ pri utilo" kiel Konfuceo, Mozio eksplicite montris: "Levu ĉiajn utilojn kaj eliminu ĉiajn malutilojn en la mondo!" Lia fina celo ne estis egoisma kiel tiu de Yang Zhu, sed por la bono de ĉiuj suferantoj, por ke la malsataj havu manĝaĵojn, la frostiĝintaj vestojn kaj la laborantaj ripozon.

La esenco de moziismo estas interamo. Same kiel Konfuceo, ankaŭ Mozio vivis en tumulta tempo. Vivante en tia tempo, Mozio observis diversajn sociajn problemojn: "Grandaj regnoj atakas malgrandajn", "grandaj familioj malordigas malgrandajn", "fortaj prirabas malfortajn", "majoritato tiranas minoritaton", "ruzaj trompas honestajn", kaj "malbonuloj interbatalas per armiloj kaj veneno". Kial ekzistis tiaj ĥaosaj fenomenoj? Mozio opiniis, ke la kaŭzo estas "manko de interamo". Inter reĝoj kaj korteganoj, inter patroj kaj filoj, inter fratoj, familioj, regnoj kaj homoj, ĉiu amas nur sin mem sed ne la aliajn, eĉ damaĝas la interesojn de la aliaj. Laŭ sia analizo kaj kono, Mozio elmetis "doktrinon de interamo". Li diris: "Se ĉiuj en la mondo interamos, regnoj ne atakos sin reciproke kaj familioj ne malordigos unu alian, do ne estiĝos rabistoj kaj ŝtelistoj, aperos favorkoreco kaj respekto inter reĝoj kaj korteganoj, patroj kaj filoj, kaj tiamaniere la mondo estos bone regata." Li konkludis: "Interamo kondukas al bona regado, kaj intermalamo al ĥaoso." Kiel do realigi tiun principon? Mozio metis sian esperon sur la regantojn, atendante, ke ili favorkore alprenu rimedojn tiurilate.

Cetere, Mozio pledis ankaŭ por "senmiliteco". Li rigardis militon kiel "grandegan katastrofon" en la mondo. Milito malhelpas plugadon en printempo kaj rikolton en aŭtuno, konsumas riĉaĵojn, perdigas ĉevalojn kaj bovojn kaj viktimigas soldatojn. Por forigi tiun "grandegan katastrofon", li oponis kontraŭ milito, tamen li oponis nur kontraŭ tia milito, en kiu granda regno prirabis malgrandan, sed ne kontraŭ la justa milito, per kiu la popolo punis despoton. Li distingis la justan militon disde la maljusta, tio manifestis lian elstaran saĝon. Tamen li ne komprenis, ke liberigo de la lando el la dissplitiĝo kaŭzita de la feŭda separatismo estas atingebla nur per milito. Tial lia "senmiliteco" estis nepraktikebla en la ĥaosa tempo.

Interamo kaj senmiliteco estas ĉefa enhavo de moziismo diferenca de aliaj doktrinoj. Ĉar Mozio pledis por interamo kaj senmiliteco,



Mozio kaj Gongshu Ban en prova operacio

oponis kontraŭ prirabo de granda regno al malgranda, li do nature malhelpis Chu-regnon ataki Song-regnon. "Malhelpi Chu-regnon ataki Song-regnon" estis lia provo de praktikado de interamo kaj senmiliteco.

La doktrinon de Mozio vualis ia religia superstiĉo. Li paroladis pri la ĉielo kaj fantomo kaj apogis siajn asertojn per tute personigita "ĉielo" kaj homeca "fantomo". Konfuceo estis diskreta pri la fantomo kaj dio, sed Mozio, tute malsama, multe parolis pri ili. Ĉu li vere kredis je la ĉielo kaj fantomo? Ne tute. Li diris, ke la ĉielo havas sian volon kaj povas "premii pro bonfaro kaj puni pro fiago", eĉ premii aŭ puni reĝon. "Se la reĝo faras bonon, la ĉielo premios lin; se li despotas, la ĉielo punos lin." Per tio Mozio celis timigi la reĝon, ke li ne aŭdacu fari ĉion laŭ sia kaprico. Mozio postulis, ke la reĝo obeu la "volon de la ĉielo" kaj efektivigu "justan regadon". Li diris, ke la penso pri interamo, utilismo kaj senmiliteco apartenas al la "volo de la ĉielo", kiun la reĝo devas obei, kaj liaj rimedoj kontraŭ ĥaoso, kaj malutiloj (ekz. ŝparado, simpla entombigo, enoficigo de talentuloj ktp.) kontribuas al la "justa regado", kiun la reĝo devas praktiki. "Obei la volon de la ĉielo" kaj "praktiki la justan regadon" fakte estis revo de Mozio, per kiu li intencis puŝi la reĝon agi laŭ lia doktrino. Samtempe Mozio utiligis "fantomon" por timigi friponojn. Li opiniis, ke la kaŭzo, kial malfidelaj korteganoj, senkoraj filoj, perversaj rabistoj, nenifaraj oficistoj kaj mallaboremaj sentaŭguloj fiagas kaj parazitas, ĝuste kuŝas en tio, ke ili ne scias, ke ankaŭ la fantomo havas la potencon "premii pro bonfaro kaj puni pro fiago". El ĉio ĉi oni vidas, ke Mozio estis tre interesa filozofo. Fakte Mozio kredis nek je fantomo kaj dio, nek je fatalo. Li opiniis, ke ne la sorto destinas noblecon, honoron, riĉecon, saton kaj varmon kaj oni povas ŝanĝi la realon per subjektiva klopodado. La sorto ne povas regi la homojn. Tio ja estas la esenco de lia "nekredo je fatalo". Ĝi multe diferencas de tiu de konfuceanismo, kiu opinias, ke "la sorto destinas la vivon kaj morton, kaj la ĉielo la riĉecon kaj honoron". La antaŭa inspiras homojn kaj la lasta deprimas homojn.

Leginte la verkon de Mozio, ni ne povas forgesi liajn vortojn "koni la estontecon de afero laŭ ĝia pasinteco, koni la esencon de afero laŭ ĝia fenomeno". La frazo estas filozofia. "Koni la estontecon de afero laŭ ĝia pasinteco" signifas, ke la disvolviĝo de afero havas rilatojn de stadioj de tempoj. Se oni konas la pasintecon de afero, oni povas imagi ĝian estontecon, kaj tiel oni povas altigi sian kapablon antaŭvidi. "Koni la esencon de afero laŭ ĝia fenomeno" signifas, ke fenomeno de afero havas rilaton kun ĝia esenco. Oni povas laŭ la aperinta fenomeno de afero koni ĝian esencon kaŝitan malantaŭ la fenomeno. "Pasinteco" kaj "fenomeno" estas videblaj kaj konataj, dum "estonteco" kaj "esenco" estas nevideblaj kaj ne konataj. Se nur oni posedas ĝustan metodon por observi la aferon, oni povas koni ĝian "estontecon" kaj "esencon". La vortoj de Mozio helpas tiujn, kiuj volas sin saĝigi. ■

---

## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.**

* Deziras korespondi tutmonde Esperante:
1. Anĝelo Ĉirpanski, 20-j. studento, Str. "Kapitun Rajĉo" 70, BG 4000 Plovdiv, Bulgario.
2. Ivo Ĉirpanski, 16-j. lernanto, Str. Sini Urah 55, BG 4230 Asenovgrad, Bulgario.
3. Ivan Dimitrov, oficisto 35-j., Str. Hristo Polimerov 18, BG 4230 Asenovgrad, Bulgario.
4. Svetla Valĉeva, instruistino 23-j., Str. Aleksandar II V-7, BG 4230 Asenovgrad, Bulgario.

* 16-j. litovia lernantino volas trovi 16-25-jarajn amikojn, interesiĝas pri muziko, turismo kaj geografio. Adr: Lina Ĵiĉkute, Laukininku 29-27, Klaipeda 235822, Litovio, USSR.

* Dez. kor. tm. pri ĉt. Hobby Samleren, P.O. Box 1099, N-5001 Bergen, Norway.

* Gabriela Draghici, 21-j. studentino de Medicina Instituto, dez. kor. tm. Adr.: Str. Brinduselor 39, Ap. 26, 2200-Brasov, Rumanio.

* Mi (Viktoro Makarenko), 36-j. kaj mia filo Aleksandro, 13-j., kolektas poŝtmarkojn pri faŭno. Sovetunio, Kijevo-42, Iv. Kudri, 9, ap. 28.

* Alfreds Gegermanis, 61-j. pensiulo, dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: Ciemupe Str. Mednieku 2, SU-228320 Kegums, Latvio, USSR.

* Igorj Simonov, 31-j. historiisto kaj preleganto en pedagogia supera lernejo, dez. kor. pri ĉt., precipe pri religio kaj ateismo, E-movado, superaj lernejoj. Adr.: SU-603105, Gorkij, ul. Genkinoj 39A-15, USSR.

* Ehsan Khojastefar interŝ. bk kaj pm. Adr.: P.O. Box 64915-178, Masjedsolayman, Iran.

* Viglaj pensiuloj dez. kor. Grupgv. Lennart Magnusson, Poppelgat 61, S-213 62 Malmo, Svedujo.

* Dementjev Dmitri, 15-j., dez. kor. tm. pri ĉt., Adr.: SU-185014, Karelio, Petrozavodsk, ul. Berjozovaja Allea, 25-112, USSR.

* Vladimir Ĥrenov, 29-j. mekanikisto, dez. kor. kun esp-istoj inter 20-35j. pri diversaj temoj. Adr.: 142645-SU, Moskva obl, Oreĥovo Zujevskij rojon, Malkovo, 8, USSR.

BIAN BAO:

# Ĉu aperos alia miraklo de la mondo?

LA argilaj soldatoj kaj ĉevaloj de la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio, subteraj trezoroj de Famen-templo kaj aliaj historiaj objektoj faris la faman historian urbon Xi'an vigla turisma loko de Ĉinio. La jara pasaĝera kvanto de la malgranda Xi'an-a aerodromo superas milionon. Ofte okazas, ke la malfacila trafiko ĉagrenas alilandajn turistojn. Sekve, konstrui modernan internacian aerodromon fariĝis urĝa afero. Kaj Xianyang nordokcidente de Xi'an estis elektita kiel loko por konstrui novan aerodromon.

Arkeologoj en prifosado




Xianyang antikve estis la ĉefurbo de Qin-dinastio. La maŭzoleoj de 9 imperiestroj de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.-23 p.K.), tiuj de 12 imperiestroj de Tang-dinastio (618-907 p.K.) kaj multaj aliaj antikvaj tomboj kiel montetoj viciĝas sur la tero de Xianyang. Laŭ la postulo de la ŝtata antikvaĵ-protekta leĝo, arkeologoj faris esploran boradon sur la aerodroma konstruejo. Tie oni trovis pli ol 30 tombojn de la Norda Zhou-dinastio (557-581 p.K.) kaj elterigis ĉ. 3 000 valorajn antikvaĵojn de la Norda Zhou- kaj Tang-dinastioj.


Laŭ la plano oni devas konstrui ferman aŭtovojon de la aerodromo ĝis Xi'an kun longo de 19 km. Arkeologoj faris 367 000 bortruojn sur la vojo kaj trovis unu antikvan urboprotektan rivervojon, du tombojn, tri ruinojn de maŭzoleaj konstruoj kaj kvar akompanajn fosojn de Yangling-maŭzoleo, maŭzoleo de imperiestro Liu Qi (156-141 a.K. sur trono) kaj lia edzino.

Nun oni konstatis post esploro, ke en la maŭzolea regiono troviĝas 24 akompanaj fosoj en 14 vicoj. El ĉiu foso oni elterigis argilajn homfigurojn. Ĉiuj fosoj havas oblongan formon kaj kuŝas laŭvice de okcidente orienten. La fosoj, ĉiu kun larĝo de ĉ. 4 m kaj profundo de ĉ. 7 m, distancas je 20 m unu de alia kaj longas je 20-291 m. La 24 fosoj havas totalan longon de 2 600 m kaj areon de pli ol 10 000 kvadrataj metroj. Kun la interfosa areo, ili longas je 320 m de oriente okcidenten kaj larĝas je 300 m de sude norden. La totala areo atingas 96 000 kvadratajn metrojn. Ĉe ambaŭ finoj de la fosoj etendiĝas deklivaj vojoj. Pli ol unu metron super la fundo de la foso estas teraso. La fundo kovriĝas de lignaj tabuloj kaj ambaŭflanke de ĝi staras lignaj fostoj, kiuj same altas kiel la teraso, kaj sur ili estas metitaj lignaj tabuloj, fragmitaj matoj kaj tero. Ili konsistigas bonordan kaj kompaktan subteran ĉambron.

Tiel grandaj kaj bone konstruitaj akompanaj



Kolora argila homa kapo



Argilaj homaj kapoj elterigitaj

fòsoj estis malofte vidataj en la antaŭa prifosado de Han-dinastiaj tomboj. Arkeologoj reordigis 300 argilajn homfigurojn en la kvar fosoj. La argilaj homfiguroj, altaj je pli ol 60 cm, estas nudaj kaj senbrakaj viroj kun nigra hararo, ruĝeta vizaĝo kaj elstara brusto. La korpo estas karnokolora kaj eĉ la seks-organo estas delikate skulptita. La senbrakaj homfiguroj estas sveltaj. Laŭ la analizo de elterigitaj silkaj pecetoj, la argilaj homfiguroj portis silkajn vestojn. Antaŭ longe la silkaĵo putriĝis kaj oni nun vidas nur nudajn argilajn homfigurojn. Pri la kaŭzo, kial brakoj mankas al la homfiguroj, fakuloj havas malsamajn opiniojn. Tio estas enigmo solvota.

La argilaj homfiguroj de Yangling estas realismaj eminentaj verkoj. Ili havas simetriajn proporciojn, fluajn liniojn kaj fortikan korpon. La skulptistoj heredis kaj disvolvis la skulpturon de Qin-dinastio. La priskribo de la vizaĝa mieno atingis la plej altan nivelon de la samspeca skulpturo de Han-dinastio. La homfiguroj portas malsamajn mienojn. Iuj kun rideto havas ovajn vangojn, belajn okulojn kaj buŝangulojn supren levitajn kaj estas eble civilaj korteganoj, akompanantaj la imperiestron; aliaj havas kvadratajn vangojn kun elstaraj zigomoj, densajn brovojn, grandajn okulojn kaj estas eble bravaj generaloj gardantaj la maŭzoleon; triaj havas pufan vizaĝon, larĝan frunton kaj okulojn rigardantajn antaŭen. Verŝajne, ili estas gvardianoj de la imperiestro.

Krom argilaj homfiguroj, oni elterigis ankaŭ grandan kvanton da armiloj kaj produktiloj. Inter la armiloj troviĝas feraj lancoj, spadoj, kupraj arbalestoj, sagopintoj ktp; inter la produktiloj estas feraj adzoj, ĉiziloj ktp. Krome, vidiĝas ankaŭ jungilaroj kaj ornamaĵoj. Ĉiuj armiloj kaj produktiloj estis malgrandigitaj konforme al la raporto de 1/3 por natura homo kaj argila homfiguro. La arto de la objektoj estas alta. Ekz., fera lanco longas je 5 cm, fera spado je 20 cm, kupra sagopinto je malpli ol 2 cm, sed iliaj formoj kaj surfacoj povas rivali kun tiuj de veraj armiloj. La elterigita ronda kupra monero kun diametro de 1 cm, kvadrata truo en la mezo kaj reliefaj ideografiaĵoj surface estas la plej malgranda el la antikvaj moneroj trovitaj ĝis nun en Ĉinio. La multaj kaj bonkvalitaj feraĵoj kaj kupraĵoj elterigitaj el la fosoj plene montras la altan nivelon de la tiama fera kaj kupra afinacio. Tiuj antikvaĵoj havas gravan signifon por esplori la socian kaj ekonomian evoluon de la Okcidenta Han-dinastio.

Kvankam oni prifosis nur kvar akompanajn fosojn en la maŭzolea regiono Yangling, tamen la akiraĵoj mirigas la rigardantojn. Kiel grandiozan scenon oni vidos, post kiam la aliaj fosoj estos prifositaj kaj iliaj antikvaĵoj estos eksponataj! Tiam la loko fariĝos muzeo por esplori la historion de la Okcidenta Han-dianstio. Ĉu la argilaj homfiguroj de Yangling-maŭzoleo povos esti rigardata kiel alia monda miraklo, se oni rigardas la argilajn soldatojn kaj ĉevalojn de la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio kiel miraklon de la mondo?

Kompreneble, por prifosi kaj protekti Yangling-maŭzoleon, la ĉina registaro jam donis instrukcion, ke la Trafika Ministerio transloku la aŭtovojon norden. En la estonteco, tuj post kiam la ĉinaj kaj alilandaj pasaĝeroj forlasos la Xianyang-an Internacian Aerodromon, ili vidos la miraklajn argilajn homfigurojn de Yangling-maŭzoleo. Ĝi fariĝos alia turisma loko de Xi'an.

■

SUR NIA LIBROBRETO

# LERNU LUDANTE!




NE okazas ofte, ke ekstermovada firmao produktas rimedon por helpi la instruadon de Esperanto. Tamen tion faris en Hungario la presejo Pannon Nyomda en urbo Veszprem: Ĝi produktis proprariske instruhelpilon.

La lingva ludilo troviĝas en libroforma skatolo, bele kaj firme kovrita, samformata kaj preskaŭ samdika kiel la Plena Ilustrita Vortaro. Ĝi enhavas kartetojn kun la dimensioj de 6  3.5 cm, sur kiuj estas presitaj aparte ĉiuj afiksoj, prepozicioj kaj 200  400 vortoj. En la skatolo troveblas ankaŭ broŝureto, kiu kvinlingve (Esperante, hungare, germane, hispane kaj angle) informas pri la uzado de la lingvoludilo por komencantoj. Por progresantoj nur Esperante legeblas la informoj pri maniero de taksado kaj ses ludmanieroj. Aparta ĉapitro priskribas la 16 regulojn kiel bazon de gramatiko, kaj fine troveblas listo de 200 plus 400 vortoj, kies signifon la uzantoj povas enskribi en sia propra lingvo.

Uzante la 770 vortokartetojn kaj afiŝokartojn oni povas lerni la vortojn kaj perfektigi sian lingvoscion. Ekzemple oni tiras 5 vortojn, per kiuj uzante la afiksojn kaj prepoziciojn — eblas fari plurajn frazojn. Sed ne gravas, ĉu la frazo havas sencon aŭ ne, gravas nur, ke gramatike ĝi estu perfekta. Tio helpas perfektigon de la lingvouzo, samtempe la strangaj frazoj ĉiam amuzas la kunludantojn.

Ĝi estas akirebla kontraŭ 28,50 guldenoj ĉe Libroservo de UEA.

Recenzis **ILONA SIRKÓ**
(Hungario)

---

POR KOMENCANTOJ

## Ŝtelisto, knabineto kaj ŝraŭbturnilo

SU Hong estis detruonta la seruron de fremda pordo per ŝraŭbturnilo. Subite li aŭdis voĉon de knabino: "Oĉjo, kion vi faras?"

Su Hong surpriziĝis. Kiam li vidis, ke tiu estas 6-7-jara, li mensogis: "Mi soifas, mi volas akvon."

La knabineto malfermis la pordon kaj, starante sur la piedpintoj, elboteligis por li tason da akvo. Trinkante li pensis, ke estas tre facile tromp-akiri de la naiva knabineto ian valoraĵon.

Enirinte en la internan ĉambron, Su Hong vidis televidilon sur ŝranko kaj ekĝojis: "Knabineto, kiom da homoj via familio havas?"

"Panjo kaj mi. Panjo jam iris al laboro..."

Kompreneble ŝi ne povis scii, ke tiu "oĉjo" estas ŝtelisto. Subite larmoj ekruliĝis el ŝiaj okuloj. "Aĥ, kial vi ploras?"

Ĉe la demando la knabineto ekploregis: "La kamaradetoj dir-

AMUZOJ


# PUZLO


La subaj interesaj bildoj estas kunmetitaj el la dekstraj bildopecoj de usonaj infanoj.

Oni faras unu bildon nur el unu kompleto da bildopecoj. Kompreneble, ne ĉiu kompleto estas tute uzita en unu puzlo.

Kiam vi elfaras deziratan bildon, gluu ĝin sur kolora papero kaj donu al ĝi nomon.

Se vi volas, bonvolu skribi viajn nomon kaj adreson sur la dorso de la bildo kaj sendi ĝin al "Amuzoj" de nia redakcio. Poste "Amuzoj" sendos al vi memoraĵon.





is, ke mia patro estas ŝtelisto kaj punlaboros dumvive. Ve! Fipatro, fipatro..."

Su Hong eksentis frapon sur la koro. Ankaŭ li havas filineton. Se iutage li estos enkarcerigita, ankaŭ ŝi ploregos.

"Via patro certe revenos," li konsolis.

"Se li revenos, mi ne lasos lin eniri en la domon!"

Su Hong estis korpremata. Li ne volis plu resti. "Ne ploru, kna-



bineto! Mi devas foriri."

"Oĉjo, ludu kune kun mi! La kamaradetoj evitas min," ŝi plorsingultis.

"Mi havas aferon. Ni ludu estonte!" Nun Su Hong jam perdis la kuraĝon ekrigardi ŝin.

"Oĉjo, tiun vi forgesis."

Su Hong sin returnis kaj vidis, ke en ŝia delikata maneto estas lia damninda ŝraŭbturnilo. Lia koro kvazaŭ estis pikita de la instrumento...

# ĈINA ĈIGONG-O

de XU SHITIAN

## V. KVIETA BUDHISMA ĈIGONG-O — ĜIGŬAN-METODO

Ĝigŭan-metodo, kvieta budhisma ĉigong-o, estis kreita de Zhiyi (538-597), la fondinto de Tiantaizong-sekto de la ĉina budhismo. La metodo postulas koncentri la atenton sur iu difinita afero, objekto aŭ sceno kaj zorge observi ĝin. Tial Ĝigŭanmetodo celas reguligi kaj plifortigi la cerban funkcion.

Tiu ĉi metodo estas efika por kuraci malsanojn kaŭzitajn de viscera perturbo, kiaj temperatura anormaleco kaj kapdoloro kaŭzitaj de kardioperturbo; ŝveliĝo, doloro en la membroj kaj rinito kaŭzitaj de pulmoperturbo; psika streĉiteco, malĝojo, kapdoloro kaj ambliopeco kaŭzitaj de hepata perturbo; juko, doloro kaj manko de apetito kaŭzitaj de liena perturbo; kaj ezofaga malglato, ventra ŝveliĝo kaj aŭdada febliĝo kaŭzitaj de rena perturbo.

Antaŭ la ekzercado vi devas fari preparadon: Frotu la manojn ĝis varmiĝo, masaĝu la kapon, vizaĝon, bruston, ventron kaj membrojn, malrapide turnu la kolon kaj talion kaj sidiĝu en ajna pozo montrita en la bildoj 1-3. Nun reguligu la spiron. Elspiru dekkelkajn fojojn per la buŝo kaj imagu al vi, ke la varmo en via korpo eliĝas el la poroj. Post tio malrapide fermu la okulojn. (Pli bone vidiĝu fendeto inter la palpebroj. La kompleta fermo de la okuloj dum la ekzercado povas kaŭzi dormemon.) Malstreĉu la ventron ĉe la enspiro kaj streĉu ĝin ĉe la elspiro. En- kaj elspiru nur per la nazo. Faru la spiron senĝene, ritme kaj profunde, kaj ne tro forte. Estas bone, se vi ne aŭdas la spiradon. Ĉe la eksterordinara sensado, kiu montras, ke vi troe atentas la spiradon, vi devas malpliigi vian atenton al la spirado kaj kelkfoje fari la spiradon senĝene por forigi la sensadon.

Fininte la reguligon, vi povas turni vin al la reguligo de la menso.

Estas du metodoj por la reguligo.

a. Fiksu vian menson sur la nazpinto: Liberigu vin el ĉiu ajn penso, fiksu vian atenton sur la nazpinto, daŭre malstreĉu la ventron ĉe la enspiro kaj streĉu ĝin ĉe la elspiro. Dank' al longa ekzercado, vi sukcesos fiksi vian atenton kaj malaperos al vi ĉiu ajn penso.

b. Fiksu vian menson sur la umbiliko: Liberigu vin el ĉiu ajn penso, fiksu vian atenton sur la umbiliko, imagu al vi, ke aero eliĝas el la naztruoj kaj iras rekte al la subventro. Pro longa ekzercado nature malaperos al vi ĉiu ajn penso.

Ĉe la komenco de la ekzercado vi eble sentas iom da doloro, juko, varmo kaj malvarmo en la korpo. Tio estas normala en la ekzercado. Vi ne devas esti maltrankvila, nek atenti tion. Kiam la ekzercado atingas certan gradon, vi havos ian halucinon, ekz., iam vi sentos vin tre malpeza, kvazaŭ flugonta, teruriĝos, vidos antaŭ vi monton kaj riveron aŭ sentos, ke iu parolas kun vi. Tiuokaze vi ne devas timi nek teni ĝin. Longa ekzercado certe malaperigos la halucinon.

Estas bone, se vi ekzercas vin per tiu ĉi metodo ĉiutage unuaŭ du-foje, po 30-60 minutojn en difinita horo ĉiufoje. Finu la ekzercadon laŭ la metodo de nejjanggong-o (Bv. legi la artikolon "Ĉina Ĉigong-o" sur p. 41, n-ro 7 de 1990). ■



Sido en natura pozo



Sido kun unu kruro sur la alia



Sido kun krucitaj kruroj

# Amantoj de orfiŝoj

Teksto kaj fotoj de **LING YOUJUAN**




EN la loĝkvartalo Chegongzhuang de Pekino estas movoplena bazaro de orfiŝoj. Tie ĉiutage vidiĝas amaso da amantoj de orfiŝoj.

Orfiŝoj estas speciala produktaĵo de Ĉinio. Dank' al la longatempa bredado kaj senĉesa selektado naskiĝis multaj specioj. Buntaj kaj belformaj, ili tre plaĉas al la rigardantoj. Oni donis al ili interesajn nomojn, kiaj ruĝĉapulo, longvivul-kapulo, perloskvamulo, ruĝvertulo kaj ŝvelpalpebrulo. Nun ili vidiĝas en multaj ĉinaj familioj.

En varma somero mi venis al la bazaro de orfiŝoj en Chegongzhuang. Post kelkaj minutoj mi sentis sufokan varmon, tamen la ĉirkaŭaj homoj, ĉu vendantoj, ĉu aĉetantoj, ĉiuj absorbiĝis en orfiŝoj. Iuj aĉetantoj ŝvitantaj estis zorgeme elektantaj orfiŝojn. Iu mezaĝulino diris al mi, ke ŝi biciklis tien du horojn por aĉeti orfiŝojn. "Kial vi tiel ŝatas orfiŝojn?" mi demandis. "Ĉar mia filo ŝatas ilin, mi helpis lin en prizorgado kaj iom post iom ankaŭ mi ekŝatis ilin," ŝi respondis kun rideto.




Inter la aĉetantoj iuj estas komencantoj, kiuj iris tien kun vitra ujo aŭ plasta sako por aĉeti orfiŝojn, kaj aliaj estas spertuloj. Mi konas danc-instruiston de iu arta instituto. Li bredis jam plurajn generaciojn de orfiŝoj. Li havas gvidanton, kiu estas veterano kun riĉa sperto en bredado. En ĉiu ĉambro de lia hejmo estas akvarioj. Frumatene aŭ vespere li ofte biciklas 2 aŭ 3 horojn al la antaŭurbo por serĉi nutraĵon por siaj fiŝoj. Dimanĉe lin allogas la bazaro de orfiŝoj. Tie li interparolas kun orfiŝo-amantoj por interŝanĝi spertojn aŭ orfiŝojn. "Kun orfiŝoj mi forgesas ĉiujn miajn ĉagrenojn," ĝoje li diris. Rigardante la gajan mienon ĉu de junuloj ĉu de maljunuloj, mi nature memoras amantojn de opero, danco, birdo kaj filatelo. ■




Orfiŝoj

Fotoj de **LI YINGMIN**



En bazaro de orfiŝoj

Kolektado de fiŝnutraĵo en la antaŭurbo



# Ĉevalaj karavanoj en Bonan-montaro

Teksto de XU YE kaj WANG QINGHUA

Fotoj de XU JINYAN

DE la urbo Dali, la vojo Yongchangdao serpentas okcidenten. Ĝi transiras Yunlong-ponton super la rivero Yangbi kaj eniras en Bonan-montaron. Tie montoj estas altaj, valoj profundaj, kaj konserviĝas multe da antikvaj vojoj. Se vi iros tien, vi povos aŭdi paŝbruon de karavanoj.

## ĈEVALAJ KARAVANOJ

Pro komplika topografio la trafiko de la sudokcidenta limregiono de Ĉinio estas malfacila de antikve. En tia situacio la Suda Silka Vojo ludis apartan rolon. Eĉ en la komenco de la 50-aj jaroj en Yun-

Lancang-rivero



nan estis tri ĉefaj karavanaj vojoj al Birmo, Vjetnamio kaj Laoso. Nun la totala longo de la karavanaj vojoj en Yunnan superas 50 000 kilometrojn, pli granda ol tiu de la ŝoseoj, fervojoj, akvovojoj kaj aerlinioj de la provinco. La ĉevalaj karavanoj ludas rolon neanstataŭigeblan.

La karavanistoj estis tre fieraj pro sia okupo. Ili multe vojaĝis, multe spertis kaj sciis detale pri la landinterno kaj foraj lokoj. Kamparanoj akiris de ili ne nur bezonatajn varojn, sed ankaŭ freŝajn informojn. La longa historio de karavanoj kreis karavanajn kantojn originalajn. La idiliaj kantoj distras la karavanistojn en enuiga vojaĝo kaj prezentas vidindajn pejzaĝojn kaj morojn de diversaj lokoj. La enhavoriĉa kanto estas kiel lakona enciklopedio de karavana vojo. Oni kantas tian kanton dum taga irado kaj ripozado ĉirkaŭ bivaka fajro, jen soloe, jen ĥore, jen kanone. Ili verŝas siajn sopiron kaj ĝojon en la kantado.

Kiam ni estis transirantaj la montaron Bonan, ni renkontis karavaneton el nur 7 ĉevaloj. Akompanate de ĉevala ronkado kaj sonorado de tintiloj, juna karavanisto de baj-nacio kantis "Montogrimpon":

*Al rajdantoj sur Bonan*
*Blovas vento malvarma.*
*Gvidado de karavano,*
*Okupo ne facila.*

*Ripozo ĉe Lancang plezura,*
*Vido sub la monto vasta.*
*Ĉie lirlas rojoj,*
*Kurantaj en la riveron.*

La junulo diris al ni, ke li estas novico de la karavano kaj ne bone konas la vojon nek bone kantas. Lia ĉefa tasko estis serĉi liverantojn de varoj kaj lerni lingvojn de aliaj nacioj. Li aldonis kun plena fido, ke li trovos multajn liverantojn de komercaĵoj kaj kantos pli bone, kiam li ellernos la lingvojn de lisu-, tibet- kaj ji-nacioj.

## PRAMEJO SUB APIKA MONTO


La ĉefpinto de Bonan-montaro altas 2 100 metrojn. Oriente de la montaro estas la fekunda ebenaĵo Yongping, kaj okcidente de ĝi torentas la muĝanta Lancang-rivero. Ni atingis la montosupron kaj vidis, ke ni estas ĉirkaŭitaj de verda ĉeno el 18 montpintoj. Mito diras, ke ili estas transformiĝintoj de 18 junulinoj. Ili venis de fore, laŭ la antikva Silka Vojo. Kiam ili returnis sin kun rigardo al la ebenaĵo, ili fariĝis la montpintoj kaj por ĉiam restas en Bonan.

En la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K — 23 p.K.) la okcidenta parto de Yunnan estis la plej ĉarma loko ĉe la Suda Silka Vojo. Tie produktiĝis oro, arĝento, kupro kaj fero, vivis pavoj kaj rinoceroj. Krome, oni povis aĉeti tie ankaŭ fremdlandajn vitraĵojn kaj perlojn. Pro tio la loko estis nomata "trezorejo". En 69 p.K. regnestro Liu Mao de la regno Ailao en la okcidenta Yunnan submetiĝis al la Orienta Han-dinastio, kaj la imperiestro de la dinastio sendis soldatojn larĝigi la vojon Yongchangdao, kun la celo akiri pli da trezoroj. Tiam la soldatoj hakis ŝtonojn en Bonan-montaro kaj konstruis ponton super Lancang-rivero. Pene laborante ili kantis kun indigno:

*Dank' al favoro de la kortego*
*Han,*
*Nia laboro senfine daŭras en*
*Bonan.*
*Bonan, Nanjin, Lancang,*
*Ĉie ni ŝvitegas por alies ĝuo.*

Poste, oni notis la kanton kaj donis al ĝi la titolon "Trans Bonan". Ĝi estas la plej frua popola kanto en Yunnan kaj de longe disvastiĝas sur la Suda Silka Vojo. La prikanto kaj malbeno en la kanto longdaŭre influis la posteulojn loĝantajn ĉe Bonan kaj Lancang.

Restas en Bonan-montaro vojoj hakitaj de antikvuloj. La antikva kaj kvieta urbeto Shanyang estas trairata de vojo pavimita per ŝtonoj. La vojo en formo de W kondukas al la montosupro. Pluraj terasoj ĉe la vojo estas bonaj ripozejoj por karavanoj. Paŝado en miloj da jaroj kavigis la ŝtonan pavimon. Sur la montosupro estas arkado kun gravuritaj ideogramoj "La Vojo Longa" kaj "Montoj la Ĉielon Skrapantaj". Sub la montaro Lancang-rivero galopas de norde suden. Ni malsupreniris al la bor-




Karavano


Sur la antikva Silka Vojo

do de la rivero kaj trovis, ke ni jam atingis la pramejon Lanjin.

Antaŭe tie estis pramejo por ŝipoj. Poste oni konstruis ponton super la rivero el liano kaj bambuo, kaj pli poste, la ponto estis konstruita el ligno. En 1475 tie aperis ponto el feraj ĉenoj. Ĝi havas la belan nomon "Ĉielarko". La ponto longas 106 metrojn, kun spano de 60 metroj. La planko kun larĝo de 4 metroj sterniĝas sur 16 dikaj feraj ĉenoj. Ambaŭflanke de la ponto estas du apogĉenoj. La ekstremoj de la ĉenoj firme fiksiĝas sur la bordoj. Ĝi estas la plej frua ferĉena ponto en Ĉinio. Sur rokoj okcidente de la rivero estas ĉizitaj skribaĵoj de antikvaj literaturistoj, ekzemple, "Mirinda Pramejo ĉe Apika Roko", "La Unua Ponto en la Sudokcidento", "Seruro en la Sudo", "Fortika Fortreso" k.s. Preskaŭ ĉiuj skribaĵoj akcentas la gravan situon de la loko.

Bedaŭrinde, ni ne havis la ŝancon iri sur la ĉena ponto, ĉar en 1986 la superakvo, plej granda en la lastaj cent jaroj, detruis la ponton. La terura terŝoviĝo ŝtopis la riveron, ke la fluo kuregis returne kaj rompis la 18 ĉenojn kaj ankaŭ la abutmentojn. Ĝis nun la ponto restas neriparita kaj oni denove uzas ŝipojn por transiri la riveron.


## PORDO DE YONGCHANG

Transirinte Lancang-riveron kaj surakvan fortreson, la Silka Vojo atingas la antikvan urbon Baoshan, pordon de la sudokcidento al la eksterlando.

Antaŭe Baoshan nomiĝis Yongchang, parto de la regno Ailao en la antikveco. Poste, la loko ŝanĝis sian nomon pro la monto Taibao okcidente de la urbo. En la loko tre prosperis salfarado, fiŝbredado kaj brutobredado. Tie produktiĝis ankaŭ oro kaj arĝento. Dum 600 jaroj antaŭ 420 p.K. la loko estis frekventata de hindaj kaj landinternaj komercistoj. Ili negocis pri oro, sukceno, silko, teksaĵo, konko k.a. Eĉ ŝtataj oficistoj el la landinterno povis akiri tie grandan riĉon sufiĉan por iliaj postaj dek generacioj. Ĉar multaj vojoj nodiĝis en Yongchang, oni nomis tiun parton la vojo Yongchangdao.


Dum la dinastioj Han kaj Jin (206 a.K. — 420 p.K.) tekstilado de Yongchang estis avangarda kun kotonaj kaj lanaj teksaĵoj. Tiam la regnanoj de Ailao lernis de sichuan-anoj tekstilan teknikon. Ili povis teksi el fibroj de ruita kapoko. Ailao-anoj tre respektis siajn prapatrojn. Kiam ili pretigis tian teksaĵon, ili unue metis ĝin sur la tombojn de siaj antaŭuloj, por ke ĉi tiuj povu scii ilian kapablon. Post tio ili faris veston el la teksaĵo.

Kun la prosperiĝo de la komerco inter Ĉinio, Hindio kaj Birmo, aperis speco de go(vejĉio)-pecoj faritaj el agato, sukceno kaj glimo. Oni nomis ilin jongzi-oj (go-pecoj de Yongchang) aŭ junzi-oj (go-pecoj de Yunnan). Ili aperis en la dinastioj Tang kaj Song kaj furoris en la dinastioj Ming kaj Qing kaj ĝuas la renomon, ke "go-pecoj de Yongchang estas la plej superaj en la mondo". Ili estas rigardataj kiel ŝtata trezoro. La blanka peco estas opala kaj la nigra havas en si verdan koloron. Metante ilin sur gotabulon, la ludantoj povas aŭdi agrablan soneton, kvazaŭ perloj falus sur jadan pladon. Admirinde estas, ke la go-pecoj sentigas varmeton en vintro kaj malvarmeton en somero. Tial goistoj tre ŝatas junzi-ojn. Ili ĝuas altan renomon en kaj ekster la lando, sed oni facile neglektas la fakton, ke ili devenis de Yongchang, pordo de la Suda Silka Vojo. ■





Antikva vojo ĉe Lancang-rivero


Yunlong-ponto



Antikva urbopordo de Baoshan








En la Silka Fabriko de Baoshan

Printempa priklado ĉe Bonan-montaro





# Komerca strato en la Somera Palaco

Teksto de **LI QIANG** Fotoj de **LING YOUJUAN**

ANTAŬ 250 jaroj estis la plej prospera periodo de Qing-dinastio, la lasta feŭda dinastio de Ĉinio. Tiam la imperiestro Qianlong rekviziciis elstarajn arkitektojn kaj metiartistojn de Ĉinio por konstrui Qingyiyuan, grandiozan imperiestran ĝardenon en la okcidenta antaŭurbo de Pekino. La konstruado daŭris 15 jarojn kaj elspezis multege da mono. Oni diris, ke Qianlong estis obeema filo. Dum sia vivo li 6-foje vojaĝis al regionoj sude de Yangzi-rivero, kaj en la unuaj 4 fojoj kune kun sia patrino. Poste pro maljuneco lia patrino ne eltenis la lacecon de longa vojaĝo. Por kontentigi ŝian sopiron al la akva lando sude de Yangzi-rivero, la imperiestro Qianlong ordonis konstrui straton laŭborde de la Malantaŭa Lago ĉe la piedo de la malantaŭa Wanshou-monto en la ĝardeno Qingyiyuan imite la stilon de sudaj konstruaĵoj kaj nomis ĝin per la nomo de fama urbo Suzhou.


Kvankam ĝi estis komerca strato kun diversaj butikoj, tamen ĝi funkciis ne por komercado, sed, kiel speciala pejzaĝo en la ĝardeno, por gajigi la imperiestrajn patrinon, familianojn kaj parencojn per sudstilaj pejzaĝoj kaj sudaj moroj. En la historio, oni nomis tian straton en imperiestra ĝardeno palaca foiro. Jam en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a.K.) oni faris notojn pri tio. De post Han-danastio (206 a.K. — 220 p.K.), la similaj foiroj destinitaj por promenado kaj distriĝo de imperiestroj kaj iliaj edzinoj fariĝis tradiciaj konstruaĵoj en la ĉinaj imperiestraj ĝardenoj.


Bedaŭrinde, antaŭ 130 jaroj la Angla-Franca Alianca Armeo invadanta Pekinon forbruligis Qingyiyuan. En 1888 por festi la 60-an datrevenon de sia naskiĝo, la imperiestra patrino Cixi rekonstruigis Qingyiyuan per mono asignita al la mara armeo kaj ŝanĝis ĝian nomon en Someran Palacon. Tamen pro financa malfacilo la pejzaĝo en la malantaŭaj monto kaj lago restis ruinoj en herbaroj kaj malordo. Meze de la 80-aj jaroj de la 20-a jarcento Caturdvipa, grupo da imponaj tibet-stilaj temploj sur la akso de la malantaŭa monto ripariĝis, kaj allogas multajn turistojn. Tie oni povas ĝui la tibet-stilan pejzaĝon de la Tibeta Altebenaĵo. Nuntempe, la nove rekonstruita

"Policanoj" sur la strato



En te-trinkejo





La rekonstruita Suzhou-strato


Suzhou-strato etendiĝas ĝuste proksime de Caturdvipa, ambaŭborde de la Malantaŭa Lago. Tie la ĉarma pejzaĝo kvazaŭ kondukas la vizitantojn suden de Yangzi-rivero.

Suzhou-strato pli ol 300 metrojn longa de oriento al okcidento estas dividita per rivero en du partojn kaj la 64 butikoj estas ligitaj per 8 pontetoj. Ĉiuj butikoj odorantaj antikvecon estas dekoraciitaj per luksaj arkaĵoj. Fakuloj diris, ke tie ĉio similas al la antikvaj, inkl. de la alte kuŝantaj ŝildoj kaj pendaĵoj super la pordoj kaj eĉ la dekoro de la butikoj. Ekz., Lûxiangzhai kaj Dengyunzhai funkcias kiel butikoj de ŝuoj; Weiyihao — kiel butiko de ĉapoj; Yinxianju kaj Huixianju — kiel drinkejoj; Pinquanzhai — kiel te-trinkejo... Lombadejo, incenso-vendejo kaj monŝanĝejo, ne troveblaj en Ĉinio dum la lastaj jardekoj, denove aperis sur la strato, kio tre larĝigis la vidkampon de junaj vizitantoj.

Interŝanĝo de antikvaj kupraj moneroj imite faritaj



Per la kuranta mono oni povas ŝanĝi en monŝanĝejo kuprajn monerojn, imitaĵojn de la antikvaj, kiuj estas destinitaj sole por uzi en Suzhou-strato. La kupraj moneroj havas tri grandojn, ĉiu kun delikata formo kaj verdigro. Per ili, la vizitantoj sur Suzhou-strato povas aĉeti objektojn, trinki teon kaj vinon, veturi per boato aŭ palankeno, kaj sate ĝui muzikon luditan per kord- kaj blov-instrumentoj kaj la sudajn pejzaĝojn. ■




Mastro (dekstre) en vesto de Qing-dinastio



Suzhou-strato en nokto




Alilandaj turistoj

# Novtipaj ĉinaj aŭtoj servas al vi!

**Dizela ŝarĝaŭto CA 141:**

Kun alta ĉevalpovo, malmulta konsumo de brulaĵo kaj granda fortikeco
Ŝarĝkapablo: 5 tunoj
Forto: 135 ĉevalpovoj
Konsuma kvanto: 5.3 litroj por 100 km/t.


**Personaŭto Audi 100:**

Farita per teknologio enkondukita el Audi AG de FR Germanio
Bela, komforta kaj sekura


## Mendu ĉe:

Unua Aŭtomobila Fabriko
Str. Yingchun, Changchun, Ĉinio

Telefono: 52883 52674
Telegramo: 0888
Telekso: 83009 JFFAW CN




Dizela ŝarĝaŭto CA 141
Personaŭto Audi 100



# FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

de **ALEKSANDR KOVALJOV**
(Sovetunio)



Perdriko



Lasta neĝo

世界语《中国报道》一九九一年第一期（本刊代号：二——九一五）国内统一刊号：CN11-1339